

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

UNESKO
40-JARA

•

POR SOBRA
VIVMANIERO

•

TRADICIA
FESTO

•

FIERA
BILANCO

•

JUNA
ESPERANTISTO

•

NI RECENZAS

•

ENLANDA
MOVADO

•

ESPERANTO
EN LA
TRIA MONDO



JARO 56 • N-RO 2 • FEBRUARO • 87

UNESKO: 40 jaroj da agado



Antaŭ 40 jaroj (la 4-an de novembro 1946), nur kelkajn semajnojn post la fino de la Dua Mondmilito, kunvenis en Londono la Konferenco de Aliancaj Edukministroj por akcepti la Konstitucion de Unesko.

Al la terura kosto de ses jaroj da detruado kaj morto, kiujn la mondo ĵus travivis, nun aldoniĝis la minaco aŭgurita per la eksplodo de du atombomboj ĉe Hiroŝima kaj Nagasaki. Super la ruinoj de la neniigitaj urboj, ene de la ĉiea doloro, frontante perspektivon pri novaj formoj de amasmortigo, la komunumo internacia konsciigis pri tiuj komunaj devoj, kiujn ĝi devus alpreni por certigi la estontecon de nia socio.

Kadre de la nove starigita sistemo de Unuigintaj Nacioj, Unesko ricevis la taskon progresigi internacian pacon kaj la komunan bonfarton de la homaro, pere de „la edukaj, sciencaj kaj kulturaj rilatoj de la popoloj de la mondo“ — alivorte, internacia intelekta kunlaboro.

Celante realigi „iun staton, en kiu la instigojn al milito nuligos sociaj, spirita kaj ekonomiaj pliboniĝoj...“, Unesko implikiĝis en vigla agado en multaj diversaj kampoj — la disvolvo de grandiozaj, normigaj konceptoj; la diskonigo de scioj, ideoj kaj informoj; kaj praktikaj agoj por helpi al la plej malriĉaj landoj. Ĉi tiu agado celis i. a. kultivi reciprokan konon kaj komprenon inter la nacioj; plifaciligi per taŭgaj metodoj de kunlaboro la utiligon fare de ĉiuj popoloj de tio, kion ĉiu estis produktinta kaj produktanta en ĉiuj popoloj de tio, kion ĉiu estis produktinta kaj produktanta en ĉiuj kampoj de pensado, arta kreado kaj scienca kaj teknika malkovro kaj esplorado; realigi kondiĉojn, en kiuj ĉiu havus egalan ŝancon edukigi; kaj ebligi liberan interŝanĝon de ideoj kaj informoj.

Dum la jaroj, Unesko senĉese plilarĝigis la bazon de sia reprezenteco. Ĝia agado je tiu ĉi flanko konstante kreskis laŭ amplekso kaj komplikeco — aparte pro la aligo, dum la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj, de preskaŭ cent landoj, kiuj tiutempe akiris la rajton de memregado.

Tiuj ĉi landoj kunportis siajn historiajn kaj kulturajn spertojn en la Organizon; ili esprimis siajn apartajn interesojn; ili elvokis siajn proprajn zorgojn. Aparte temas pri la evoluantaj landoj, kiuj starigis demandojn rilatajn al la malfacilaj, foje eĉ timigaj, cirkonstancoj, kiujn ili alfrontis, al la multflankaj defioj, kiuj baris la vojon, kaj al la diversaj rimedoj, kiujn ili priesploris por certigi evoluon aŭtentikan.

Tiel Unesko komencis pripensi la realon de pli kaj pli interdependa mondo, en kiu socioj interkontaktigas laŭ pli aŭ malpli alta grado, kaj konsistigas partojn de tutmonda sistemo de reciprokaj interŝanĝoj kaj rilatoj.

Pro tiu disvolvigo, Unesko, kiu unue koncentris siajn agojn al difinitaj mondopartoj, iom post iom estis instigita etendi ilin mondskalen.

Dum la lastaj kvardek jaroj, Unesko tiel ebligis disvolvon de tuta aro da komunikaj, interŝanĝaj, kunlaboraj kaj kunagaj retoj, etendiĝantaj en la plej diversajn kampojn, gvidantaj al kolosa progreso en scioj kaj lertoj, kaj instigantaj la popolojn kaj la kulturojn de la mondo alproksimiĝi unuj al la aliaj.

Tra la tuto de tiuj jardekoj, Unesko strebis ĉerpi el tri fontoj de energio — la politika realo de la registaroj de Ŝtatoj-Membroj; la krea impulso de spirita, intelekta kaj arta komunumo; kaj la kompetento kaj sindono de internacia Sekretariato, kiun oni alvokas por subteni kaj kunordigi la ideojn, iniciatojn kaj projektojn de ĉiuj.

Mi ne povas fini sen aldoni, ke la mondo hodiaŭ renkontas nombron da gravaj malfacilaĵoj, kiuj speguliĝas en la funkciado de la sistemo de Unuigintaj Nacioj, kaj sekve en Unesko.

Tiuj malfacilaĵoj sendube prezentas okazon denovan por ekzameni kelkajn el la funkcioj de la sistemo, cele al ilia demokratigo; tamen, ili jam kaŭzis tion, ke iuj homoj pridubis la motivojn kaj celojn de la sistemo, kaj eĉ la bazajn kialojn por ĝia ekzisto.

Tiu ĉi ne estas la unua fojo, kiam Unuigintaj Nacioj frontis defiojn tiajn. Tial estas grave, ke la estroj de la diversaj instancoj de la sistemo akceptu siajn respondecojn en plena mezuro.

Ne plu temas pli tio, ke ili simple progresigu laŭeble la nuntempajn aferojn. Laŭ sia konsciencgvido, observe al la principoj de la Ĉarto de Unuigintaj Nacioj kaj de la Konstitucioj de siaj respektivaj organizoj, ili ankaŭ — kaj tio eble eĉ pli gravas — devas levigi super dependajn kaj flankajn aferojn por gardi sekurajn ĉiujn ŝancojn por la estonteco.

En tiu ĉi jaro, kiu markas la kvardekan datrevenon de Unesko, mi estas kun tiu konvinkigo, ke mi denove alvokas ĉiujn intelektulojn tra la mondo por plifortigi, per nia Organizo, la ligojn de solidareco bazita sur la fortoj de libereco, kreemo kaj progreso — ĝuste tiuj fortoj de la spirito, por kies kunigo Unesko ekzistas.

Amadou MAHTAR M'BOW

**Tiu ĉi teksto estas mallongigita versio de parolado, kiun faris la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro Amadou Mahtar M'Bow, okaze de datrevena ceremonio en Parizo, kiu ni represas el revuo „Esperanto“ — n-ro 10/1986.*



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 56

FEBRUARO

2 • 1987

POR SOBRA VIVMANIERO!

Antaŭ nelonge aperis en la gazetaro aparte grava speciala decido de la Politika Buroo de Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio pri limigo de la konsumado de alkoholaĵoj, precipe de tiel nomataj koncentritaj alkoholaĵoj.

En la decido de Politburoo oni konstatas, ke multaj ŝtataj organoj kaj sociaj organizaĵoj ne plenumis siajn proprajn decidojn partopreni aktive en la batalo por limigo de alkohol-konsumado fare de junuloj kaj serioze limigi tiun konsumadon fare de la plenkreskuloj. Rezulte de tiu neglekto oni povas kun granda bedaŭro konstati, ke la konsumado de alkoholaĵoj kiel ĉe plenkreskuloj, tiel ankaŭ ĉe la junularo ege plialtiĝis. Precipe maltrankviliga fenomeno estas la konsumado de fortaj alkoholaĵoj kun alta procento de alkoholo. Plialtiĝas la nombro de personoj sisteme konsumantaj alkoholaĵojn kaj de la alkoholuloj, fariĝas kutima fenomeno la ĉiutaga alkohol-konsumado pro diversaj okazoj. Kaj kiel plej alarma tendenco reliefigas la plivastigo de alkohol-konsumado inter la junularo.

Tial la intereso de la lando, de ĉiu familio, de ĉiu aparta individuo postulas, ke oni senkompromise ekbatalu kontraŭ la alkoholismo kaj drinkado, organizu vastan kaj efikan kontraŭalkoholan propagandon, insiste kontraŭbatalu la kutimon drinki, decide limigu la produktadon kaj konsumadon de alkoholaĵoj, ĉefe koncentritaj. Necesas ankaŭ pliseverigi la sankciojn, kiam oni neglektas tiujn malpermesojn kaj limigojn.

Plej grava tasko estu la plena elimino de alkohol-konsumado fare de junularo; konsiderinda malpliigo de ties konsumado fare de plenkreskuloj; firma elradikigo de la kazoj de sistema drinkado kaj de alkoholismo.

Por atingi tiun celon oni uzu la disponeblajn ekonomiajn, ideologiajn, edukajn, leĝajn, administraciajn k. a. rimedojn. Tiu ĉi batalo estas tutpopola kaj havas grandan signifon por la hodiaŭa kaj morgaŭa tago de Bulgario. Pri ties realigo devas okupiĝi la partiaj, ŝtataj, ekonomiaj kaj sociaj organizaĵoj kaj organoj, la laborkolektivoj, la lernejo, la familio, la amaskomunikiloj, la tuta publika opinio.

Al la Ministra Konsilantaro Politburoo preskribas postuli severan administran kaj financon respondecon de organoj kaj oficistoj neaplikantaj la decidojn por batalo kontraŭ la alkoholismo kaj aprobi ukazon kun novaj pli severaj sankcioj kontraŭ la kulpuloj. Krome, per la ĉiujaraj produkto-planoj malaltigi per dek procentoj la produktadon de alkoholaĵoj, precipe de la koncentritaj, destinitaj por interna komerco.

Politburoo emfazas, ke la batalo kontraŭ la alkoholismo, por sobra vivmaniero, estas tradicia linio de la Bulgara Komunista Partio.

Nuntempe multaj fortoj estas direktitaj al plenumado de tiu decido de Politburoo de CK de BKP.

La Ministra Konsilantaro jam publikigis koncernan ukazon kaj la organoj de la nacia kontrolo sistemo faras kontrolon surloke por konstati kiel la faritaĵojn, tiel ankaŭ por aktivigi aŭ eĉ sankcii tiujn organojn, kiuj ankoraŭ ne plenumas deĉe siajn taskojn.

Ankaŭ al la sociaj organizaĵoj oni proponas entrepreni efikan propagandan laboron por eduki siajn membrojn en spirito de sobra vivmaniero ĉiutaga.

Bulgara Esperantista Asocio ne povas stari flanke de tiu ĉi tutpopola batalo. Ĉiuj organoj de BEA devas kunlabori al la ŝtataj organoj, al la ceteraj sociaj organizaĵoj, precipe al tiuj de la Patrolanda Fronto, kies kolektiva membro estas nia asocio, por realigo de tiu grava decido de Politburoo kaj de la Ministra Konsilantaro de PR Bulgario.

Eble oni dirus: „Tamen por la bulgara esperantistaro ne validas la konstato pri amasa konsumado de alkoholaĵoj“.

Ni ne posedas statistikajn ciferojn tiurilate, sed la kutima observo de Esperanto-arangoj, la praktiko en iuj seminarioj, festivaloj ktp pruvas, ke ankaŭ la esperantistoj en iu aŭ en alia grado konsumas alkoholaĵojn, precipe la modernajn — la koncentritajn. Antaŭ la Dua Mondmilito la esperantistaj kaj la abstinenculaj societoj preskaŭ konstante kunlaboradis. Sed nuntempe tiu ligo de la esperantista movado kun la agado de la Nacia Komitato pri Sobro ne

estas tiel vigla, eĉ ekzistas certa malintereso al la movado pri sobra vivmaniero.

Tio pruvas, ke ankaŭ inter la esperantistaro oni devas klarigi la sencon de la decido de Politburoo kaj la ukazon de la Ministra Konsilantaro. En la spirito de tiu kleriga agado oni devas ankaŭ fari praktikajn paŝojn por plialtigi la aktivadon de la esperantistaro en komunaj aranĝoj kontraŭ alkoholismo kaj drinkado, por organizi interesan internan vivon de la esperantistoj dum kunvenoj kaj aliaj aranĝoj, sen uzo de alkoholaĵoj. La esperantista agado donas multajn eblecojn racie utiligi la energion de niaj

adeptoj, precipe de la junuloj. La natura strebo de la junularo al gaja, distra vivo devas esti ligata kun la fundamentaj taskoj de la esperantistaj organizaĵoj. Tio certe sufiĉas por direkti la atenton de la junularo al pli senchavaj okupoj, kiuj engaĝos ties energion kaj helpas por elkresko de sobraj, inteligentaj esperantistoj.

Do, antaŭ ni — esperantistoj, la decido de Politburoo ankaŭ starigas tre seriozajn taskojn. Ni pruvu, ke ni konscias pri tio kaj per nia praktika agado kaj persona konduto kontribuos por sanigi kiel nian propran, tiel ankaŭ la ĝeneralan atmosferon en nia lando.

Nikola ALEKSIEV



De la 10-a ĝis la 15-a de decembro 1986 en la Nacia Kulturpalaco „Ljudmila Jivkova“ okazis por kvara fojo Tagoj de la Esperanta Kulturo, kies organizanto estis Sofia Esperanta Domo de Kulturo „Maksim Gorkij“. Ili estis dediĉitaj al la Internacia Jaro de Paco kaj al la 100-jara jubileo de Esperanto. La celo de la kulturtagoj — propagandi kaj disvastigi la Internacian Lingvon, estis brile atingita per anticipa informado de la neesperantista publiko pere de afiŝoj kaj artikoloj en la nacia gazeto, kaj dum la Tagoj mem — pere de televid-raportoj.

La Tagoj de la Esperanta Kulturo estis solene inaŭguritaj la 10-an de decembro je la 18 horo. La direktoro de SEDK „M. Gorkij“ — Nedka Valjaviĉarska, skizis la historion, celojn kaj antaŭstarantajn taskojn de tiu tradicia aranĝo. Sekvis parolo de la heroo de socialisma laboro, merita aganto de la kulturo — Nikola Aleksiev, honora prezidanto de MEM, per kiu li informis la ĉeestantojn pri la vivo de

TRADICIA FESTO

la aŭtoro de Lingvo Internacia, pri la naskiĝo de Esperanto kaj pri ĝia rolo kiel nova momento en la kultura evoluo de la socio.

La dua parto de la vespero komenciĝis per la muntaĵo „Nia kara lingvo Esperanto“ laŭ verkoj de Zamenhof, Baghi, Szilagy, Rossetti k. a., preparita de Belka Beleva, sub la reĝisorado de la merita aktorino Gertruda Lukanova. Per parolo kaj kantoj la geaktoroj el Bulgara Esperanto-Teatro, la kantistino Maria Angelova kaj la lernanto Konstantin Pavlov revivigis bildojn pri la vivo de Lidia Zamenhof kaj ŝia patro, pri la unuaj universalaj kongresoj kaj pri la unuaj paŝoj de la internacia lingvo Esperanto tra la mondo.

Multajn aplaŭdojn gajnis la popola aktorino Margarita Duparinova pro sia neforgesebla plenumo de „La vojo“. Aparte impresis la profunde emociigaj plenumoj de kordinstrumenta kvarteto „Espero“ kaj de la populara bulgara estrada kantistino Margarita Radinska. Intereson vekis la deklamo de la aktorino el BET — Reni Kitanova, kiu prezentis sian tradukon de fragmento el „Ruslan kaj Ljudmila“ de A. Puŝkin, akompanate per mandolino de Radoslav Dojĉinov. „Ekbrilis nova stelo sur la podio de la profesiaj kantistoj-esperantistoj“ — tiel la publiko pritaksis la unuan aperon de la juna kantistino Ljudmila Kocева. Ŝiaj bela voĉo kaj majstra plenumo impresis la spektantojn. Per operarioj sin prezentis ankaŭ Maria Dermengieva el la Stata Muzika Teatro — Jambol, Karamfilka Adamova, Stefka Kalimenova kaj Stojan Bojilov.

Sin prezentas la Sofia Literatura Rondo „Asen Grigorov“

En kulturdomo „Emil Ŝekergjiŝki“ la 11-an de decembro okazis literatura legado, kiun partoprenis la anoj de la Literatura Rondo kun artgvidanto Georgi Miĥail-

kov. En sia inaŭgura parolado li menciis, ke la ekzistado de la Literatura Rondo dum pli ol 25 jaroj ne estas hazarda en lando, kiu havas 80-jaran E-kulturon.

„Dum tiu ĉi tago ni bruligu la torĉon de la E-kulturo, por ke ĝi lumigu nian kreaĵon vojon antaŭen“ — konklude diris li.

Proprajn verkojn kaj tradukojn legis preskaŭ ĉiuj rondanoj. Per multaj aplaŭdoj la ĉeestantoj dankis al Antoaneta Atanasova pro ŝia belega plenumo de „La fonto de la blankpiedulino“ (P. R. Slavejkov, traduko de ADA), al la aktoro el BET Miĥail Zdravev pro liaj delikataj kaj intimaj „Lirikaĵoj versoj“ kaj al la gastino el Jambol — la E-poetino Penka Papazova.

Scienc-teoria konferenco

Longe atendata estis la scienc-teoria konferenco „100 jarojn Esperanto serve al la paco“, okazinta la 12-an de decembro en la Nacia Kulturpalaco „L. Jivkova“. La intereso estis provokita ne nur de la fakto, ke partoprenis kiel prelegantoj elstaraj bulgaraj esperantistoj, sed ankaŭ pro la varieto de la temoj, kiuj skizis la vojon de la Lingvo Internacia en diversaj aspektoj.

La bazan raporton pri temo „La esperantistoj kaj la paco“ prezentis Violin Oljanov, ĉefredaktoro de gazeto „Paco“. „La tero ŝvelas pro amasigita armilaro, nevidita en la historio kaj neimagebla laŭ sia amasmortiga forto — diris la preleganto. Per la nuna kvanto la homaro kelkfoje povas esti tramurdita, la mondo disdetruita, la miljara kulturo fornenigita sen iaj ajn restaĵoj...“

Sed kiel batali?... La bazaj principoj de Mondpaca Esperantista Movado estas: unue — utiligo de Esperanto serve al paco kaj reciproka kompreno inter la popoloj. Due — malpermeso de



La solena inaŭguro

ĉiuj amasdetruaj armiloj kaj ĉesigo de la vetarmado. Likvido de fremdaj militbazoj, ĝenerala, samtempa kaj kontrolata malarmado — konkludis V. Oljanov.

Per temo „Interkomprenigo, paco, evoluo“ sin prezentis la sekretario de MEM Vasja Cvetkova kaj pri temo „Paco en arta programo de Bulgara Esperanto-Teatro“ parolis nia elstara aktorino Belka Beleva. Ŝi skizis la kreaĵon laboron de la E-aktoroj, kiuj pli ol 25 jarojn estas en la unuaj vicoj de la esperantistoj-pacbatantoj.

Fine elpaŝis la du plej junaj prelegantoj: E-poeto Georgi Miĥalkov pri temo: „Originala E-poezio serve al la paco“ kaj redaktorino en gazeto „Paco“ Veneta Baleva pri „Junularo kaj paco“. Ambaŭ referaĵoj portis la optimismon de la juneco kaj la kredon, ke la mondo transvivos la nuan danĝeran politikan situacion, por ke la junularo vivu kaj kreu en paco.

Celebrado de esperantistoj-kultur-agantoj

Vespere la 12-an de decembro en la Nacia Kulturpalaco la etoso estis aparte festa. Komenciĝis la celebrado de esperantistoj-veteranoj, agantoj de la kulturo: Georgi Dolapĉiev — tradukisto, Anani Anev — aktoro el BET kaj Donĉo Hitrov — ĵurnalisto, ĉefredaktoro de la presorgano de BEA „Bulgara Esperantisto“. La solenaĵon malfermis la Ĥoro de Sofiaj Esperantistoj. En sia gratulparolo al la jubileuloj, la sekretario de Urba Estraro de BEA Ivan Peev emfazis ilian multjaran poresperantan laboron kaj la atingitajn de ili sukcesojn.

En sia parolo pri la vivo kaj agado de G. Dolapĉiev, Stefka Ĉenkova diris: „Mi volus varme kaj elkore premi vian manon por esprimi la sentojn de tiuj, kiuj estimas kaj ŝatas vin.“

Sekvis elpaŝo de B. Beleva pri ŝia vivkunulo kaj teatra partnero A. Anev:

„Duonjarcenton sur la scenejo, pli ol 250 rolojn, partopreno en pli ol 20 filmoj, reĝisorado de 34 spektakloj, arta arango de samnombra kvanto da teatraĵoj... ŝajnas al mi, ke tio sufiĉas por havigi al vi imagon pri la arto de la aktoro el Stata Muzika Teatro Anani Anev, kies vivo- kaj kreo-sorto estas unueca tuto.“

En la nomo de la redakta kolektivo de „Bulgara Esperantisto“ pri la vivovojo kaj krea agado de Donĉo Hitrov parolis Maria Jankova: „Estas tre agrable por mi paroli pri unu el la tre popularaj esperantistoj-ĵurnalistoj — Donĉo Hitrov. Li estas homo kun moderna pensmaniero, kiu ne nur aspektas juna, sed vere estas tia laŭ koro kaj animo.“

En la nomo de UE de BEA donacon al A. Anev prezentis d-ro Cveta Ŝtamenova. La prezidanto de BEA Ĥristo Gorov, post mallon-

ga gratulparolo, prezentis donacojn al kamaradoj Dolapĉiev kaj Hitrov.

Sekvis emociplenaj gratuloj de merita aktoro Petko Sirakov, prezidanto de sekcio „Veteranoj de la scenejo“ kaj de Ĥrisan Baĉvarov, adresitaj al ilia kolego Anev.

La jubileuloj danke respondis al ĉiuj gratuloj kaj bondeziroj.

„Mi ne timas la maljunecon, ĉar en mia koro ekzistas unu forta apogo — Esperanto“ — konklude diris D. Hitrov, esprimante tiel la sentojn de ĉiuj celebratoj.


La solenaĵon kronis la koncerto de amatoraj plenumantoj, recipe lernantoj, kies puraj infanvoĉoj atingis la korojn de la ĉeestantoj. Unue elpaŝis la plej etaj esperantistoj — infanoj el Tuttaga Infangardeno n-ro 152; sekvis plenumoj de kantgrupoj el 4-a kaj 8-a unuecaj lernejoj, de grupo por deklamado „Serdika“, de Conka Ruseva kaj dela baletistino Svetla Borisova.

„Tri viroj en la neĝo“

Per la prezento de tiu ĉi spektaklo estis fermitaj la Tagoj de la Esperanta Kulturo, la 15-an de decembro. La teatraĵo, jam gajninta grandan internacian popularecon dum la UK en Augsburg, estis vere inda finiĝo de la kulturtagoj, por kio kontribuis la bonega rolado de la aktoroj el BET.

La Tagoj de la Esperanta Kulturo montris ankoraŭfoje, ke la Lingvo Internacia vivas kaj disvolviĝas, gajnas novajn adeptojn kaj amikojn. La rezulto de la persista laboro de la organizantoj el SEDK — Nedka Valjaviĉarska kaj Bojidar Aleksiev, evidentiĝis sukcesplena, ĉar tiu E-arango jam provokas grandan intereson ankaŭ inter la vasta neesperantista publiko kaj estiĝas ĉiam pli enhavoriĉa.

Veneta BALEVA



La jubileuloj (de maldekstre — dekstren): Georgi Dolapĉiev, Anani Anev kaj Donĉo Hitrov.

Fotoj: Evelina Ĥristova

ESPERANTISTOJ EN LA HISPANA CIVITANA MILITO

● EN HISPANION VENIS 35 000 VOLONTULOJ EL 50 LANDOJ

● LA HISPANAN RESPUBLIKON DEFENDIS ĈIRKAŬ 500 BULGAROJ, INTER ILI 15 ESPERANTISTOJ

● LA ESPERANTO-GAZETARO PRI LA HISPANA CIVITANA MILITO

Antaŭ 50 jaroj — la 18-an de julio 1936, la gazetaro kaj la radio komencis informi pri la revoluciaj eventoj en Hispanio. Ofte la novaĵoj estis malkonsekvencaj, eĉ strangaj. Kio fakte okazis?

La faŝistoj, konsente kun la hispana burĝaro kaj sub la inspiro plejparte de Mussolini kaj Hitler, agadis konspire kontraŭ la hispana respubliko kaj la laboristaro. Eksciinte pri ilia konspiro la laboristoj komencis sin pretigi kontraŭstari la preparatan faŝistan puĉon.

Frumatene, la 19-an de julio, la laboristoj atakis kaj konkeris la kazernojn. Kaj Barcelono estis en la mano de la ribeluloj.

Post Barcelono falis Madrido, Bilbao, Valencio k. a. La generaloj-puĉistoj okupis parton de Hispanio kaj la alian okupis la respublikistoj. Jen kiel komenciĝis en Hispanio la civitana milito, kiu daŭris de 1936 ĝis 1939.

Post la komenco de la civitana milito amaso da antifaŝistoj el multaj landoj sin direktis al Hispanio, por helpi al la respubliko kaj al la batalanta popolo. Kaj dum monato oktobro, laŭ iniciato kaj decido de la Komunist Internacio, la volontuloj estis organizitaj en Internaciaj Brigadoj. En la gloraj Internaciaj Brigadoj partoprenis viroj kaj virinoj el pli ol 50 diversaj landoj, pretaj helpi al la hispana popolo kaj al la respubliko en la batalo kontraŭ Franco.

En la Internaciaj Brigadoj partoprenis 35 000 volontuloj de la solidareco, kiel ilin tiam nomis la hispana popolo. 5000 el ili verŝis sian sangon sur la hispana tero.

Ankaŭ el Bulgario venis volontuloj kaj bone prezentis nian landon en tiu grandioza kaj decida batalo en Hispanio. Laŭ la libro de D. Sirkov „En defendo de la Hispana respubliko“, kie estas enlistigitaj 466 bulgaraj volontuloj, kiuj partoprenis la hispanan civitanan militon, 120 el ili pereis en la batalo. Mi persone konas pli ol dek personojn, kiuj ne estas enlistigitaj en tiu libro. En la libro de BEA „Esperanto en servo de la Patrolando“ estas publikigita listo de 12 volontuloj-esperantistoj kaj tri el ili ne estas en la libro de D. Sirkov. Do, estas pli ol certe, ke la bulgaraj volontuloj en Hispanio estas ĉirkaŭ 500 personoj, se ne pli. Ni devos ankoraŭ klopodi ĝis ni eltrovos ĉiujn.

Generale la bulgaraj volontuloj estis en la Internaciaj Brigadoj, pli speciale en 129 brigado, kiel infanterianoj kaj artileristoj. Sed pluraj estis disigitaj en diversaj hispanaj taĉmentoj — ĉu kiel specialistoj, ĉu propravole aŭ pro aliaj kaŭzoj. Grave estas, ke ili ĉiuj bone prezentis nian popolon.

Inter tiuj 500 volontuloj estis ankaŭ 15 bulgaraj esperantistoj: Vasil Apostolov Rajĉev, naskita en 1902; Vladimir Zlatanov (Rotkata) el Kjustendil, naskita 19. 11. 1906, kiu estis peze vundita ĉe Teruel kaj transportita en hospitalon apud Albasete, de kie ne povis esti evakuita kaj restis ĉe la faŝistoj. Lia plua sorto ne estas konata; Vladimir Zlatarov, naskita 19. 1. 1912 en v. Ugărĉin, pereinta apud Madrido; Georgi Ĵulev, iam tre lerta kaj originala polemikulo en leg-ejo „Ĥristo Botev“, naskita 4. 111. 1904 en v. Lisiĉevo. Pereinta apud Madrido en 1932; Dimitar Atana-

sov Birov, naskita en v. Gradevo, distrikto de Blagoevgrad. Lia frataro ankaŭ estas esperantistoj. Mortis en Sofio post la liberigo de nia lando; Kosta Georgiev Penev, eksredaktoro de „Mejdunaroden Rabselkor“, kondamnita al morto pro la agado en la cara armeo kiel komunisto. Naskita en Sadovo 6. 1. 1912. Pereis apud Madrido en 1932; Kosta Avramikov, naskita 3. VI. 1911 en u. Smoljan; Metaksa Ĥristov Guginski, naskita en 1912 en v. Levoĉevo, foreste kondamnita al morto. Pereis en Bulgario, apud Smoljan; Nikola Mladenov Todorov, naskita 10. XI. 1908 en v. Ljancinci; Petăr Dimov Jonkov (aŭ Jankov), naskita

21. JANU. N. 18 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 15 JUNIO 1937

Popola Fronto

INFORMA BULETENO INTERNACIA PRI LA HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ORGANO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA

REGISTRO N. ADMINISTRACIO: STRATO "MAR." NUM. 38

VALENCIA (Hispanio)

„... via batalo ne estas loka ribelo, ordinara eksplodo, sed revolucio, kiu starigis limojn inter du epokoj. La tuta hispana popolo batalas en la nomo de sopirata ideo pri transformo de la ekonomia kaj socia vivo...“

Vi servas al la progreso, vi defendas la liberon. Vi havas cerbon, kiu tre bone komprenis la lecionojn pri la tragedioj germana, aŭstra k. a. Vian imitindan ekzemplon aliaj popoloj sekvas. Vi devas konservi kaj firmigi vian Popolan Fronton eĉ ankaŭ post la venko. Streĉu la fortojn, hispanaj kamaradoj! Al vi estas direktitaj la okuloj de milionoj da subpremitaj homamasoj, kun simpatio kaj fido al via heroo sinteno...

Ni ankoraŭ ne povas rompi la feran ĉenon, kiu preme zonas la tutan landon. Ni ege simpatias al via batalo. En la internaciaj brigadoj troviĝas ankaŭ niaj samlandanoj. Ni ne mal-esperigas. La karceroj kreas pro abundo da popolaj gefiloj. Unu post alia sinsekvas politikaj procesoj. La kugloj ofte trafas mortkondamnitajn. Sed ni daŭrigas la eksterlegan batalon. Kaj ni venkos! Ni revidos la lumon!

Gloran sukceson en via batalo! Morton al la faŝismo!

(El letero de Tr. Ĥristovski, publikigita en la Esperanta ĵurnalo „Popola Fronto“, eldonata en Valencio, n-ro 18, 15. VI. 1937.)

20. 11. 1914 en v. Târniĉane. Pereis la 14-an de julio 1938; D-ro Simeon Grozev Dimitrov, naskita 4. IX. 1909 en v. Dragojnovo. Pereis 20. 11. 1937 apud Madrido; Săbi Diĉev Georgiev, naskita 27. XII. 1911 en v. Vâlci Dol, Varna. Pereis en Sofio 1943; Teofil Daŝinov, naskita 12. VII. 1902 en Peŝtera. Pereis 17. VII. 1937 apud Madrido; Cvetko Radojnov, naskita 23. II. 1885 en v. Krân. Elmigris Sovetion. Post reveno en Bulgario en 1941, estis mortpafita en la gar-nizona mortpafejo en Sofio 26. VII. 1942. Colo Panov

Pelteški, naskita 12. I. 1912, en v. Ugårĉin. Peris la 10-an de julio 1943 en Jugoslavio.

Multaj el ili pereis sur la frontoj de la milito kaj lasis siajn ostojn sur hispana tero.

Jam antaŭ la eksplodo de la Hispana Civitana Milito, mi havis viglan korespondadon kun hispanaj kamaradoj-esperantistoj. Estis ricevita unu afiŝo kun bildo, kiu prezentis laboristan manifestacion kaj horlogon sur la standardo, kiu montris dekduan horon sen kvin minutoj. Kaj tiuj kvin minutoj finiĝis ĝuste la 19-an de julio 1936. La 20-an de la sama monato aperis „La Informa Bulteno“ — la unua hispana informilo esperantlingva pri la revoluciaj okazintaĵoj. Nur post du-tri tagoj mi ricevis ĝin en Sofio. Mi ĉesigis mian laboron kaj dum la tago kaj la tutan nokton tradukis, kun iom da helpo de alia kamarado. La sekvan tagon mi transdonis la tradukon al la redakcio de la ĉiutaga ĵurnalo „Nova Kambana“ kaj oni bone profitis ĝin kaj samtempe propagandis la batalon de la hispana proletaro. Per tio ni ankaŭ de ĉi tie provis helpi al la hispanaj batalantoj. Tiu agado decide influis, ke ankaŭ bulgaroj direktiĝu al Hispanio. Dum tiu komerca periodo oni ekiniciatis specialan bataŭtaĉmenton de esperantistoj, kie mi kredis ke estas ankaŭ mia loko. Sed poste tiu decido estis nuligita, laŭ la konsilo de iu milita specialisto. Kaj jen anstataŭ en la esperantista, mi eniris en hispanan taĉmenton kun iu esperantisto. Dum la unuaj momentoj nur Esperanto peris mian interkomprenadon kun la estroj de ĉiuj taĉmentoj.

Kiam dum oktobro 1936 estis organizitaj la Internaciaj Brigadoj, en la komenco oni organizis esperantistan komisionon por faciligi la lingvan problemon. En tiu komisiono partoprenis la fama hispana generalo Julio (Hulio) Mangada kaj same la fama publicisto kaj verkisto generalo Ljudvig Ren. Tiu komisiono eldonis kelkajn esperantajn informojn. Sed, pro la plej granda nombro de la francaj volontuloj kaj ankaŭ pro la granda nombro de la intelektuloj, kiuj sciopovis la francan lingvon, oni akceptis la francan, sed post iom da tempo oni komprenis, ke estas preferinda la hispana kaj oni ekuzis la hispanan lingvon. En la Internaciaj Brigadoj troviĝis pluraj esperantistoj el diversaj landoj, sed estante en diversaj taĉmentoj de la poste Hispana Popola Armeo, oni ne povis kontakti, krom en tute raraj kaj hazardaj okazoj.

Iom pli poste ekaperis en Esperanto nova gazeto, ankaŭ presforma — „Popola Fronto“ (P.F). Ĝi ankaŭ estis disvastigata tra la tuta mondo, inter la esperantistaro, same kiel la „Informa Bulteno“ kiu estis redaktata de mia korespondanto Albert Mas kaj P. F. redaktis la konata esperantisto Hernandez. El tiuj gazetoj pluraj esperantistoj tradukadis, ĉiu laŭ sia gusto kaj prijuĝo, artikolojn en siajn naciajn lingvojn kaj tiel oni helpadis kaj propagandis la hispanan respublikon kaj la batalon de la proletoj por pli bona vivo kaj justeco.

Al „Popola Fronto“ kunlaboradis ankaŭ nia publicisto, verkisto kaj komunisto Trifon Ĥristovski.

La katalunia registaro (Generalitato) ankaŭ eldonis dum certa tempo stencilite sian bultenon en Esperanto. Eble el ĝi oni ankaŭ tradukadis en diversajn naciajn lingvojn kaj gazetojn.

En diversaj okazoj mi renkontiĝis persone kun pluraj esperantistoj el diversaj landoj: germanoj, nederlandano, portugaloj, kubanoj, panamiano, svedo, jugoslavoj k.a. Tutkompreneble plej multajn esperantistojn mi renkontadis el inter la hispanoj. En la koncentrejoj en Francio oni gvidis kelkajn esperantajn kursojn.

La memoro jam paligis la vizaĝojn kaj forviŝis la nomojn de multaj esperantistoj-kunbatalantoj, sed la koro neniam forgesos la internacian fratecon kaj solidarecon kaj ĉiam sonos en miaj oreloj la flamaĵoj vortoj de la kanto pri la ruĝa standardo de la revolucio!...

Nikola MLADENOV,
partopreninto en la Hispana Civitana
Milito kaj esperantisto-veterano

NIKOLA VAPCAROV

HISPANIO

Vin kia mi imagis?

Nenia. —

Por mi vi estis kruda land'

de kavaliroj kaj montplat'.

Vin kia mi imagis? —

Patrio de amo

senkompata,

sangon soifanta,

svinganta

ponardon en la man';

ebriiĝanta

per son' gitara;

per pasi',

ĵaluzo

kaj psalmoj.

Nun vin defendas mi kun vervo.

De via korp' mi estas er'.

Mi partoprenas senrezerve

en via strebo al liber'.

Mi brulas nun kaj mi jubilas,

pro via lukto kaj sukces',

al via fort' mi verŝis min —

ĉar kredas mi en ĝi sen ĉes'.

Nun mi batalas kun la kredo,

ke venkos malamikon ni

sur barikadoj en Toledo

kaj ĉe la rando de Madrid'.

Jen laborist' en bluzo blua

vundita kuŝas apud mi,

kaj sub kaskedo lia fluas

senĉese varma sanga stri'.

Ĝi ja simila estas ege

al sang' en mia la ang'i;

mi konas tiun ĉi kolegon

de fabrikej' en Lankaŝir'.

Ni ambaŭ tie ja ŝovelis,

laboris ĉe metalfandej';

ni ambaŭ tie longe revis

pri nova vivo sur la ter'...

Ripozu, kara kamarado,

sub ruĝaj flagoj dormu vi.

Penetras en min via sango

kaj en terglobo do per mi.

Nun enpenetras via sango

de urb' en urbon, al uzin';

ĝi movas, logas en lavangon

vilaĝojn kun impet' sen fin'.

Ĝi ja fortigas la esperon,

kuraĝon donas al labor'

kaj antaŭdiras la alvenon

de l' ruĝa liberiga hor'.

Sang' via barikadojn tenas,

ĝojkrias ĝi sen intermit':

„Por ĉiam, fratoj, apartenas

al ni Madrid', al ni Madrid'!

Al ni la mondo apartenas

kaj ĉiu ĝia molekul'.

En sudo

sub ĉielo hejma.

en dorm'

vi kredu,

kredu nur!

Tradukis: Ĥristo GOROV — ĤRIMA



„NI SEMU KONSTANTE...”

Dimitar Borisov estas naskita en 1898 en Pleven. En 1921 lia konato interesigis lin pri la Internacia Lingvo, havigis al li la lernolibron de Atanasov kaj Kolev kaj la junulo komencis lerni Esperanton aŭtodidakte. Lian atenton altiris ĝia facila kaj simpla gramatiko. Dum tri monatoj li ellernis la materialon. . . Tiel komencigis la Esperanto-vojo de la 88-jara veterano de nia movado Dimitar Borisov, dufoje dekorita per la Ora Insigno de BEA por lia aktiva poresperanta agado. Por li plene validas la Zamenhofaj vortoj „Ni semas kaj semas konstante. . .”.

Ĉi-sube ni proponas al niaj legantoj intervjuon de nia kunlaboranto Georgi Nejkov kun la veterano.

— K-do Borisov, vi estas konata kiel multjara kursgvidanto. Mi petas, rakontu pri tiu via aktivado.

— En 1926 mi komencis gvidi E-kurson por abstinuloj en Pleven. Pli malfrue — en 1930, mi eldonis la lernolibron „Esperanto. Konciza lernolibro por aŭtodidaktaj kaj por kursoj en 15 lecionoj, kun bildklarigoj en la teksto.”

Dum pli ol 20 jaroj mi gvidis E-kursojn. En la komenco en kelkaj uzinoj, laŭ la lernolibro de Ivan Sarafov kaj Simeon Hesapčiev. Poste — inter fervojistoj en la uzino „Georgi Dimitrov”. Laŭ profesie mi estas fervojisto. Mi laboris kiel estro de la fervoja stacidomo en Blagoevgrad kaj kiel inspektoro en la Ministerio de Fervojoj. Tie miaj gelernantoj estis simplaj laboruloj, sed ankaŭ inĝenieroj. La situacio estis tre delikata, ĉar multaj el la laboruloj forgesis la bulgaran gramatikon. Tio devigis min forlasi la lernolibron de Sarafov kaj Hesapčiev kaj anstataŭigi ĝin per la metodo de Andreo Ĉe. Pro tio mi kompilis 21 lecionojn laŭ la Ĉe-metodo, multobligis ilin stencile kaj disponigis al miaj gekursanoj. La rezulto estis kuraĝiga.

Mi gvidis ankaŭ kursojn por komencantoj kaj progresintoj ĉe la Ministerio de Fervojoj, en kiuj partoprenis inspektoroj kaj fakestroj.

Miaj lernantoj estis Georgi Litov, Slavčo Manov k. a. — nun gvidantoj de la Fervojista Esperantista Sekcio en Bulgario.

Mi instruis Esperanton en la someraj kursoj apud vilaĝo Drujevo, multfoje partoprenis en naciaj kaj internaciaj kongresoj. Kune kun junuloj-esperantistoj mi laboras sur la porpaca kampo.

— Ĉu vi havas korespondantojn?

— Mi korespondis kun multaj fidelaj kaj sindonaj pabatalantoj-esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Danujo, Usono, Francio, Germanio, Greklando, Hungario, Japanio, Jugoslavio, Sovetunio, Rumanio ktp. Nun restis nur miaj plej akurataj korespondamikoj el Francio kaj Sovetunio.

— Kiel vi refreŝigas viajn lingvosociojn?

— Jen mia labormaniero: mi reskribis la vortojn el la lernolibro „Paŝoj al plena posedo” en 30 lecionoj kun ilia esperanta klarigo en poŝkajereton, kiun mi portas ĉiam ĉe mi. Kiam mi veturas per tramo aŭ mi ripozas en parko aŭ aliloke, mi legas kelkajn paĝojn de ĝi. Komence mi legis kaj relegis la legaĵojn de tiu ĉi lernolibro, kiuj estas de diverslandaj aŭtoroj kaj, kompreneble, la stilo estas pure internacia. Tiel mi alkitimigis pensi en Esperanto. Mi regule legas nian revuon „Bulgara Esperantisto” kaj aliajn esperantajjn. Tiamaniere mi senĉese refreŝigas miajn lingvajn konojn.

Intervjuis: Georgi NEJKOV

VALORA KONTRIBUAJO POR ESPERANTO

„Cent jarojn Esperanto” — al tiu temo la semajna ilustrita revuo „Paraleli” (Paraleloj) — eldonaĵo de Bulgara Telegrafa Agentejo, dediĉis du paĝojn en sia n-ro 49/1986. Jam la kovrilpaĝo de tiu numero altiras la atenton al la ĉeftemo — Esperanto. oni vidas faksimilojn de kovriloj de multaj E-revuoj. Al la legantoj oni proponas informojn pri la personeco de Zamenhof kaj pri lia genia verko — la internacia lingvo Esperanto; pri la lasta Universala Kongreso, okazinta somere de 1986 en Pekino; publikigitaj estas ankaŭ eldiroj pri Esperanto de elstaraj politikistoj, sociagantoj, verkistoj, poetoj. La eldonagado de BEA estas prezentita per faksimiloj de tradukitaj lastatempe verkoj de famaj bulgaraj verkistoj kaj poetoj.

Sed la materialoj, publikigitaj en la revuo, ne estas reklamo de Esperanto. La baza elemento de tiu poresperanta bloko el tekstoj kaj ilustraĵoj, estas la informrica artikolo verkita de Nikola Aleksiev. La aŭtoro ne pledas direkte por Esperanto. Li pridiskutas la problemon ĉu nacia lingvo povas esti ĝia internacia? Por ilustru la aŭtoran respondon, mi citos lin: „El politika vidpunkto, el vidpunkto de ekonomio kaj kul-

turo, de ŝtata sendependeco kaj nacia individueco la privilegiita stato de unu ŝtato kaj ĝia lingvo estas absolute netolerebla. La granda Lenin esprimis tion koncize, sed ĝenie: „Absolute neniam privilegio al kiu ajn nacio kaj al kiu ajn lingvo!” (Verkoj de V. I. Lenin, v. XIX, p. 72, IV eld.)

Por ni, esperantistoj, la respondo al la dua demando starigita de Nikola Aleksiev: „Ĉu povas ekzisti kaj esti uzata artefarita internacia lingvo (planlingvo)?”, estas sendube pozitiva. Sed por la neesperantista legantaro la situacio estas alia. N. Aleksiev ne asertas, ke tiu lingvo devas esti Esperanto. Li donas eblecon al la leganto mem decidi. . . La aŭtoro rakentas en historia plano pri la ideo pri internacia artefarita lingvo. Tiu artikolo estas bona ekzemplo, kiamaniere oni devas propagandi Esperanton en neesperantistaj medioj.

Dank’ al la populara revuo „Paraleli” la bulgara legantaro eksciis pri la 100-jariĝo de Esperanto. Tio estas valora kontribuado al la celebrado de tiu datreveno en Bulgario.

Maria JANKOVA

KONATIGU: KATALUNA E-JUNULARO

Kataluna E-Junularo (KEJ) estas sekcio de Kataluna E-Asocio.

Post longa stagnado en majo 1985 okazis fakta rondigo de nia sekcio. Tiam estis elektita tute nova estraro kaj starigita tute nova proceduro en nia laboro. La elektita dekkvino da estraranoj kun tre malmulta sperto devis okupiĝi pri la ĉiufanka agado de KEJ. Pri la internaj aferoj devis esti kontrolita nia membraro kaj kreita nova regularo. Nun KEJ havas sesdek da membroj t.e. kvarono de nia membraro de KEA. La rilatoj de nia junulara sekcio kun la plenkreskula sekcio estas tre bonaj. KEJ reprezentigas en KEA-estraro per unu estrarano (el ok KEA-estraranoj); interalie, la KEA-estraranoj agas meze sub 40 jaroj.

KEJ ankoraŭ ne sukcesis starigi plenan reton de delegitoj-aktivuloj tra la lando. Por havi rektan kontakton kun la kluboj kaj aktivuloj, la KEJ-estraro intencas okazigi siajn monatajn kunvenojn en diversaj urboj. Tial ni profitas la okazon, ke ĉiun duan monatan la katalunaj esperantistoj semajnfine gastas ĉe iu E-societo en la lando: KEJ multnombre partoprenas tiujn renkontigojn kaj kontaktas la lokajn junajn esperantistojn.

La nacia kongreso ĉiujare kunigas la tutan katalunan movadon kun tre aktiva engaĝigo de la junularo. La pasintan kongreson partoprenis 235 esperantistoj, inter ili pli ol dudek eksterlandanoj el ok diversaj landoj: tiam estis solene proklamitaj la premioj de la 25-aj Floraj Ludoj — prestiĝa literatura konkurso organizata de KEA.

Julie okazas en Katalunio ankaŭ Internacia Esperantista Ferisemajno en la ĉmara urbeto Vilanova i la Geltrú, kie la partoprenantoj povas matene sunbruniĝi kaj posttagmeze ĝui interesan programon.

Fojfoje KEA organizas ankaŭ aktivulajn seminariojn. KEJ regule aperigas amuzan dumonatan revuon satiran kaj informan: ĝi havas ankaŭ rubrikon en la KEA-bulteno kaj kunlaboras en la internacia gazeto.

Pri ekstermovadaj rilatoj okupiĝas konsiderinda parto de nia estraro. Kelkaj artikoloj estis publikigitaj en diversaj nacilingvaj revuoj — bedaŭrinde ne kun grava socia rolo. KEJ ankaŭ starigis rilatojn kun la Kataluna Nacia Konsilio de la Junularo — organizo, kiu kunigas ĉiujn gravajn junularajn asociojn en la lando.

En la internaciaj rilatoj KEJ tradicie direktas sian aktivadon al partopreno en la internaciaj junularaj kongresoj, kiuj estas unu el la plej gravaj eventoj en nia junulara E-movado. La novaj aktivuloj plu iras la vojon de aktiva partopreno, kaj volas ampleksigi la kadron de siaj internaciaj rilatoj. Tiucele, sub la gvido de Itala E-Junularo, KEJ kunorganizas Mediteranean Renkontigon en Italio, kiel provo por aktivigi la regionan agadon kaj spertintersaĝon. Ilia sekcio ankaŭ klopodas por starigi aŭ renovigi la kunlaborajn rilatojn kun ĉiuj landaj sekcioj de TEJO. En tiu direkto la seminario de BEJ en Pisanica estas bonega okazo por solide kontakti plurajn junularajn E-asociojn kaj Kataluna E-Junularo tre dankas pro la amika invito de Bulgara E-Junularo. Por la plena disvolvigo de siaj internaciaj rilatoj kaj aktiva kunlaboro kun TEJO, KEJ deponas oficialan peton esti ĝi ties landa sekcio dum la jubilea kongreso en Krakovo.

Ni esperas, ke en la sekvaj jaroj la kataluna junulara E-movado, per tiu laboro, kiu nun rekomenciĝas, povos progresadi kaj atingi la socian gravecon, kiun ja meritas nia esperantista movado.

Hèctor ALOS i FONT,
prezidanto de KEJ

TRADICIA STUDENTA RENKONTIGO

Ĉiujare je la 8-a de decembro la bulgara studentaro celebras sian feston. Tiukaze ankaŭ la studentoj-esperantistoj havis la eblecon festi en la bela domo de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica de la 12-a ĝis la 14-a de decembro. Partoprenis ĉirkaŭ 50 gestudentoj el Studenta E-Societo „Vela Peeva“ ĉe la Sofia Universitato, el Varna, Plovdiv kaj aliaj altlernejoj. Gastoj de la studentaro estis junaj ĵurnalistoj el la centra ĵurnalo „Oteĉestven Front“ (Patrolanda Fronto), sur kies paĝoj oni plej ofte informas pri la bulgara E-movado. La festan renkontigon partoprenis ankaŭ junaj aktivuloj el la tuta lando.

Ci-foje la ĉefa parolado estis pri problemoj kaj atingoj de la studenta E-junularo en Bulgario kaj pri la jubileaĵo preparoj okaze de la 100-jariĝo de Esperanto. Multaj esprimis sian pretecon somere partopreni la Jubilean 43-an Internacian Junularan Kongreson en Krakovo. Interesa kvizo pruvis la bonajn sciojn kaj informitecon pri la Internacia Lingvo kaj pri ĝia movado.

Dum la mallonga restado en Pisanica oni vizitis ankaŭ urbon Smoljan kaj la planadaron, promenadis en la suna vintra naturo de Rodopi-montaro.

Dank' al siaj korespondantoj kaj amikoj en diversaj landoj la studentoj-esperantistoj estas vaste informitaj pri la nuna situacio en la mondo. Ili estas veraj pabatalantoj ĉar ili volas ĉiam en paca mondo renkontiĝi kun siaj eksterlandaj amikoj.

Cvetka MITEVA

ARANGO EN BERNBURG

La renkontigon por junaj esperantistoj, kiu okazis de la 17-a ĝis la 20-a de oktobro 1986, organizis la Distrikta Estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR en Halle, kunlaboro kun Subdistrikta Estraro Bernburg. Krom GDR-anoj la arangon partoprenis 11 gejunuloj el Pollando.

La kulmino de la arango okazis sabate antaŭtagmeze. En nova kvartalo de Bernburg, apud la ĉefa promenejo, la Urba Konsilio disponigis al la junaj esperantistoj terenon, sur kiu ili plantis arbojn. Apud unu el tiuj arboj, kiu estas fago, oni metis memorŝtonon kun surskribo „Arbo de amikeco — 100 jarojn Esperanto — 1887—1987“.

Posttagmeze ni vizitis la memorejon en la psikiatria malsanulejo, kie estas prezentitaj la teruraj, malsciencaj „kurac“-metodoj de la pasintaj jercantoj kaj la kruelaĵoj de la faŝistoj, kiuj tie gasmortigis kaj forbruligis dekmilojn da senkulpaj homoj.

Dimanche ni veturis al la montaro Harz, kie per telefono ni suprenveturis al la „Sorĉistina Dancejo“. Poste ni vizitis la groton „Hermannschöhle“.

F.

Hans-Peter BARTOS



NOVAJ LIBROJ

TRA LA VENTEGO

Ĥristo Smirnenski. *Tra la ventego*. Elektita verkaro. Tria kompletigita eldono. Sofio, Sofia-Press, 1986. Kompilis: Ivan Keremidčiev, Nikola Aleksiev. Redaktis: Ĥristo Gorov. 142 p. Formato: 23×15 cm.

La unua eldono de „Tra la ventego“ de Ĥristo Smirnenski aperis en 1931, en la kondiĉoj de faŝista diktaturo en Bulgario kaj trovis varman akcepton ĉe la proletaj kaj progresemaj esperantistoj en la mondo. Ĝia dua eldono aperis antaŭ 36 jaroj — en 1950, kiam demokratia Bulgario jam estis komencinta konstrui sian socialisman estonton.

Krom la verkoj, kiuj trovis lokon en la dua eldono (29 versaĵoj kaj 2 felietonoj, tradukitaj de Asen Grigorov, Ĥristo Gorov, Atanas Lakov, Ivan Dobrev k. a.), en la nuna eldono al tiu nombro estas aldonitaj pli ol dek novaj tradukoj de versaĵoj (la tradukojn faris Canko Murgin, Venelin Mitev kaj Violin Oljanov) kaj dektri prozaĵoj, tradukitaj de Georgi Mihalkov, Kunčo Vălev kaj Nikola Uzunov.

La verskolekto estas provizita per ampleksa kaj elĉerpa artikolo pri la vivo kaj verkaro de Smirnenski, kiu apartenas al la plumo de la fama bulgara literatura kritikisto Georgi Canev. Krome, en ĝi oni povas trovi la antaŭparolon al la unua eldono (1931) kaj mallongan noton pri Smirnenski ĉerpitan el la dua eldono (1950) — ambaŭ verkitaj de la granda bul-

gara verkisto kaj amiko de Esperanto Georgi Karaslavov.

Kiel suplemento, fronte de la libro, trovis lokon la versaĵo de la poeto Ĥristo Radevski „Ĉe la tombo de Smirnenski“.

La tria eldono de „Tra la ventego“ estas ĝoja fakto. Tiu plaĉa, eĉ luksa eldono jam delonge estis tre necesa — ĝi plenigis multjaran gravan mankon en nia E-literaturo.

ESPERANTO-POETOJ DE BULGARIO

Canko Murgin. *Esperanto-poetoj de Bulgario*. BEA, Sofio, 1985. Redaktis: Lidia Raeva. Kovrilo: Diana Velkova. 64 paĝoj. Formato: 19.5×13.5 cm. Prezo: 0,60 lv.

La ĵus aperinta verko de Canko Murgin estas unua paŝo al realigo de impona trivoluma libro pri la originala Esperanto-poezio en Bulgario. En ĝi Murgin traktas la kontribuon de Ĥristo Trijkakin kaj Ĥristo Rjaĥovski por naskiĝo de la originala E-poezio en Bulgario (1906), koncize skizas la portreton de la unua vera Esperanto-poeto en Bulgario — Petro Jordanov. Tamen la kerno de lia verko estas la poeziaj portretoj de la kvar plej konsiderindaj E-poetoj en Bulgario: Asen Grigorov, Dimitro Zlatarski (Miti), Ĥristo Gorov kaj Violin Oljanov.

„Esperanto-poetoj de Bulgario“ ne estas bibliografio aŭ konsultlibro — ĝi konsistas el apartaj studoj

YOSHIAKI MIZUNO

Raporto el Eŭropa Esperantujo

(Daŭrigo de n-ro 1/87)

NEDERLANDO

La 9-an de julio, mi bonorde atingis Amsterdamon. Mi restis en hotelo apud la Palaco de Rembrandt. Mi ege malstreĉiĝis, ĉar en la urbo abundas amuzaj kaj bongustaj.

La sekvan tagon mi vidis s-rojn F.J. Krüger kaj G. van Dijk.

La unua estas instruisto kaj poligloto. Li konas 20 lingvojn, inkluzive japanan. La dua proponis al mi unikan projekton pri la disvastiga agado lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto, kiu versajne meritas gravan konsideron.

Dum mia restado en la lando, mi ankaŭ vizitis la centran oficejon de UEA (Universala Esperanto-Asocio) en Roterdamo. Tie oni laboris, ĉiuj estis tre okupitaj, sed ĵuna stabano, Karlo, afable gvidis min en la sufiĉe granda konstruaĵo. Oni havas planon konstrui ankaŭ aldonajn ĉambrojn.

Survoje mi haltis en la ĉefurbo Hago kaj tie mi bone pasigis la tempon kune kun mia korespondanto s-ro van Maarel, pensiulo kaj amatora turistoj.

La 13-an de julio mi veturis al Rijssen, malgranda urbo en la orienta parto de la lando. Tie min

akceptis s-ro van de Zijde eks-inĝeniero kaj nun pensiulo, kun kiu mi konatiĝis pere de mia amiko esperantisto en Japanio. Mi restis en lia hejmo 3 tagojn kaj ricevis varman gastigadon. Nederlanda kamparo donis al mi grandan plezuron.

LUKSEMBURGIO

La 16-an de julio mi jam estis en la malgranda, sed belega lando Luksemburgio. Dum mia dutaga restado tie, mi konatiĝis kun multaj samideanoj dum ilia semajna kunveno. Mi parolis interalie kun s-ro Brian R. Moon, prezidanto de Luksemburgia Esperanto-Asocio, kaj s-ro Albert Wickler, sekretario de la sama asocio. Mi aŭdis, ke estas 50 ĝis 100 organizitaj esperantistoj en la lando, kies loĝantaro nombros nur 360 000. Oni montris intereson al Japanio: al la lando, popolo, kaj lingvo.

BELGIO

Post Luksemburgio mi veturis al Bruselo, la ĉefurbo de Belgio, la 18-an de julio. La sekvan tagon mi havis viziton de du esperantistoj: s-ro Marc Demonty, profesoro de

angla kaj aliaj lingvoj, kaj ankaŭ prezidanto de Belga Esperanto-Federacio, kaj s-ro Jacques de Bloudts, reĝisoro de televido. Post agrabila babilado, s-ro Demonty kondukis min tra la urbo. Precipe impresis min la Palaco de Justico, kaj la Katedralo Saint Michel.

La sekvan tagon s-ro de Bloudts afable veturigis min al la fama batalkampo Waterloo, 20 kilometrojn for de la urbo. Kun granda miro, mi rigardis per miaj propraj okuloj la vastegan ebenajn, kie konfrontiĝis antaŭ 170 jaroj Napoleono kaj Wellington. Image mi vidis la soldatojn batalantajn kaj aŭdis la kanonojn tondrantajn.

Reveninte al la urbo, ni kune gustumis bonan manĝaĵon en ĉina restoracio kaj plezure babiladis ĝis malfrue en la nokto.

Antverpeno estas la dua laŭ grandeco urbo en la lando, kiun mi vizitis la 21-an de julio. Tiu urbo estas konata en Esperantujo kiel sidejo de la Universala Kongreso en 1982.

Tie mi renkontis s-ron Manuel Halvelik, la aŭtoron de la unika verko „Universala Skribo“. Li nun laboras kiel kompostisto en la oficejo de Flandra Esperanto-Ligo.

Li gvidis min al la Ligo, kiu okupas la tutan kvar etaĝan konstrua-

tre kompetente verkitaj. Tio estas serioza provo kronologie prezenti la E-poetojn de Bulgario. Ĝi estos tre utila por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la originala E-poezio.

RAPORTO DE CK DE BKP AL LA XIII KONGRESO

Raporto de la Centra Komitato de Bulgara Komunist-partio antaŭ la Dektria partia kongreso. Sofia-Pres, 1986. Tradukis: Petko Arnaudov. Redaktis kaj korektis: Georgi Dolapčiev. 138 p. Formato: 19.5×12.5 cm.

La Raporto de CK de BKP antaŭ la Dektria partia kongreso klare montras, ke en la periodo post la Dekdua kongreso — periodo de riĉa kaj konstrua laboro — estas atingita konsiderinda progreso en ĉiuj sferoj de la vivo, kaj la partio de bulgaraj komunistoj iras al sia 100-jara jubileo kun klara programo.

Lidia RAEVA

DONACO POR KOOPERATIVANOJ-ESPERANTISTOJ

Prof. Nikola Valev, Julia Delčeva. „Evoluo de la kooperativa movado en Popola Respubliko Bulgario — nacia sperto“. Eldono de BEA, Sofio, 1986. 47 paĝoj. Mendebla ĉe BEA, Ĥr. Botev 97, Sofio, Kooperativa E-Sekcio ĉe BEA.

En dek ĉapitroj, per faktoj kaj ciferoj, la aŭtoroj montras la evoluon kaj la nunan staton de la kooperativa movado en Bulgario, klarigas la „lokon kaj rolon de la kooperativanoj en la ĝenerala soci-ekonomia evoluo“ kaj tuŝas la rolon de la diversitaj kooperativoj — kamparmastrumaj, laborproduktadaj, konsumaj kaj in-

dustriaj. Klare estas prezentita la „rolo de la ŝtato por helpado al la kooperativoj“. En konvena formo la aŭtoroj klarigas la bazajn demandojn pri la „vojoj, metodoj kaj rimedoj por la kooperativa progreso“. La lasta ĉapitro tuŝas la demandon pri „interŝanĝo de nacia sperto inter la landoj ligitaj pere de la kooperativa movado“.

Dimităr MUTUŠEV

LA IMPRESO DE BULGARIO

La amikoj de Bulgario sinjoroj Hideo Fuĝii kaj Takenori Takaragi el Japanio eldonis japanlingve la libron „La impresado de Bulgario“. Ĝi rakontas pri ilia vizito en la lando de rozoj septembre 1985. Sincere kaj kun granda entuziasmo ambaŭ japanoj dividas siajn impresojn pri tiu unika por ili vizito en Bulgario, pri sia realigita 50-jara revo vidi la patrolandon de la granda internaciisto, la heroo el Lejpego Georgi Dimitrov. Ili metis florojn kaj kliniĝis antaŭ la mauzoleo de nia popolgvidanto, antaŭ liaj monumentoj en Pernik kaj Kovaĉevci; ili kun granda intereso trarigardis la eksponaĵojn en la muzeoj de Georgi Dimitrov en Sofio kaj Kovaĉevci. Ili estis ravitaj de Sofio, de pluraj aliaj rimarkindaj lokoj en nia lando, kaj tre kontentaj pri la varma akcepto, kiun ili ĝuis en la Nacia Muzeo „Georgi Dimitrov“ en Sofio, pri la gastamo kaj komplezemo de la bulgaraj esperantistoj.

Niaj japanaj amikoj donacis kelkajn ekzemplerojn de sia libro al aktivuloj de BEA.

Vasja CVETKOVA

ĵon. Ĝi posedas ĉion necesan por eldoni esperantajn librojn kaj periodaĵojn. Mi aŭdis, ke en Antverpeno estas ĉirkaŭ 600 organizitaj esperantistoj kaj 10 procentoj de ili agadas aktive.

Poste s-ro Halvelik invitis min al tagmanĝo en sia hejmo. Li montris al mi siajn originalajn verkojn ankoraŭ neeldonitajn. Mi trovis en ili tre interesajn elpensadojn. Ekzemple, li proponas neceson de specialaj formoj de Esperanto, kiuj funkcias kiel „arkaikaj“ kaj „dialektaj“ lingvaĵoj. Lia opinio, tiuj lingvaĵoj necesas por esprimi antikvan stilon kaj provincan parolturnon. Li jam kreis tiajn vorto-formojn kaj la manuskripto estas preta por eldono, nur mankas mono kaj ŝanco.

En Belgio mi havis bonan ŝancon gustumi japanan manĝaĵojn. Mia amiko ekde la studentaj tagoj, s-ro Kanaya Yasumiti, kiu loĝas en Bruselo, gastigis min en sia hejmo. Ni parolis japane, kompreneble, kaj pasigis tre bone la tempon.

BRITIO

L o n d o n o

Mi forlasis Belgion, kaj travetu- ris parton de Francio per aŭtobuso, kaj transpasinte la Kanalon Dover, fine atingis Londonon, la ĉefurbon de Britio.

Mi jam antaŭe skribis al s-ro Philip Buttinger, kiu estas delegito de UEA kaj konstanta gastiganto de esperantistoj el fremd-

lando. Mi rezervis ĉambron en lia domo, kie loĝis du japanoj, kvar nederlandanoj kaj unu jugoslavo. La sekvan tagon mi vagadis tra tiu grandega urbo ĝis la vespero.

La 27-an de julio post matenmanĝo, s-ino Gretie Buttinger montris al mi la gastlibron, en kiu skribis la gastoj de tiu gastejo sian nomon kaj adreson, iuj kune kun sia foto. Mi trovis multajn japanojn tie, inkluzive miajn konatulojn. Ĉi tie loĝis multnombraj esperantistoj el diversaj landoj, orientaj kaj okcidentaj, kaj do la gastlibro prezentas valoran historiaĵon de la internacia amikeco per Esperanto.

Posttagmeze mi vizitis interalie la mondkonatan tenisesejon Wimbledon, ĉar mi iom praktikas tiun sporton, kvankam tre mallerte. Ankaŭ mi vizitis la straton Baker, kie „loĝis“ la fama detektivo Sherlock Holmes.

Vespere mi ĉestis la semajnan kunvenon de la Londona Esperanto-Klubo. Partoprenis ĉirkaŭ 40 personoj, kaj rimarkinde estis, ke el la partoprenantoj, 17 estis alilandaj esperantistoj, ekzemple: polaj, hungaraj, peruaj, nederlandaj, franca, germana, jugoslava, kaj norvega.

La 28-an de julio vespere mi iris per subtera trajno al la flughaveno Heathrow, por akcepti miajn familianojn, edzinon kaj filinon. Mia edzino laboras en altlernejo en Tokio, kaj mia filino nun estas en la dua jaro de mezlernejo. Jam komenciĝis la somera

libertempo en Japanio, kaj ili volis pasigi ĝin en Britio kune kun mi. Nun ni estas triopo kaj restos kune dum ĉirkaŭ 4 semajnoj. Mia edzino kunportis japanajn: manĝaĵojn kaj aliajn, valoran trezoron por mi en Britio. Krome ŝi alportis al mi kolekтивan skribaĵon de anoj de Tokorozaŭa Esperanto-Rondo, la loka grupo al kiu mi apartenas. Iliaj salutoj kaj bondeziroj al mi kuraĝigis min dum mia longa vojaĝo. Mi ankaŭ ricevis fotojn okaze de monata kunveno de la sama Rondo, kiuj montris karajn vizaĝojn de miaj amikoj-rondanoj

Southampton

Mia familio restis 4 tagojn en Londono en la hejmo de s-ro Buttinger, poste ni adiaŭis la ĉefurbon kaj alvenis al Southampton, sufiĉe granda marborda urbo sud-okcidente de Londono, je ĉirkaŭ 1 horo per trajno.

Vespere de la sama tago mi vizitis la semajnan kunvenon de la Southampton Esperanto-Klubo. Ĉestis ĉirkaŭ 20 samideanoj, inkluzive du nederlandajn gejunulojn. Oni varme akceptis min kaj mi ĝuis bonan teon kaj babiladon. Mirinde estis, ke oni ne „krokodilis“, kvankam troviĝis multaj komencantoj inter partoprenantoj.

Dum nia restado en la urbo ni rigardis vidindaĵojn, ekzemple Papilian Gardenon, kaj Stonehenge, kiu estas megalita restaĵo konstruita antaŭ 4000 jaroj.

„MI AMAS BULGARION...”

Estimataj gekamaradoj,

Antaŭ ĉio akceptu miajn korajn salutojn el malproksima Kubo. Mi memoras, ke la unuan fojon mi skribis al vi en bulgara lingvo, kiun mi lernis dum mia studado en Marmilistita Lernejo „Nikola Vapcarov” en urbo Varna. Nun mi jam finis la bazan kurson de Esperanto kaj komencos la perfektigajn kursojn, kiujn organizas Kuba Esperanto-Asocio (KEA).

Mi petis vin anonci mian adreson en via revuo kaj post certa tempo mi ricevis multajn leterojn el Pollando, Sovetunio kaj precipe el Bulgario. Mi dankas al vi pro tio kaj pro la fakto, ke mi ricevis ankaŭ du kajorojn kaj prospektreklamon de „Bulgara Esperantisto”. Mi opinias, ke ĝi estas tre interesa, ĉar ebligas al eksterlandanoj konatiĝi kun la vivo en Bulgario, kun la socia evoluo de la „lando de rozoj” kaj kun ĝia forta esperantista movado.

Multaj artikoloj en la revuo ege emociis min, ĉar ili rememorigis al mi pri multaj vojaĝoj tra Bulgario, pri miaj kontaktoj kun la laborema kaj afabla bulgara popolo. En Bulgario mi ne nur finis miajn studojn, sed mi konatiĝis kun ĝiaj historio, kulturo kaj tradicioj kaj ekamis ĝin kiel mian duan patrujon.

Mi kredas, ke la bulgara popolo, gvidata de sia glora Komunista Partio, realigos la revojn de siaj plej bonaj gefiloj. Mi ĝojas ankaŭ pri la sukcesoj de BEA, kiu daŭrigas la progresajn tradiciojn de la monda Esperanto-movado.

Kun estimo mi salutas vian redaktoran teamon kaj ĉiujn bulgarajn esperantistojn! Gis revido!

Gustavo MORALES,
Havano, Kubo.

HELPO POR ORFAJ INFANOJ

Antaŭ unu jaro Sofio akceptis 20 orfajn infanojn, gefilojn de mortigitaj partizanoj — viktimoj de la milito en Afganio. Nia lando varme akceptis ilin kaj farigis por ili dua patrolando, kie ili restos dum 10 jaroj — en la Internulejo „Ran Bosilek”. Post unujara restado de la infanoj en Bulgario, en novembro 1986 oni organizis por ili solenan renkontiĝon kun reprezentantoj de la Afgania ambasadejo. La infanoj prezentis bulgarlingve belartan programon sub la gvido de sia instruistino pri muziko — la esperantistino N. Krásteva. Post unujara lernado ili jam sufiĉe bone scipovas paroli bulgaran lingvon kaj nun, en la unua klaso, ili lernas legi, skribi kaj kalkuli.

La afganiaj reprezentantoj korege salutis en sia lingvo la etulojn kaj konsilis al ili esti ĉiam dankaj al la bulgara popolo, al siaj instruistoj, al sia „dua patrolando” — kiel nomis Bulgarian la eta Raĭla. Ili varme dankis al la direktoro J. Danĉev pro la zorgoj kaj pere de li — al la tuta lerneja kolektivo.

La solenajn ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de UE de BEA ĉe-kape kun ĝia prezidantino d-rino Cveta Stamenova, kiu rakontis pri la internacia lingvo Esperanto kaj pri la rolo de esperantistoj en la porpaca batalo kaj por realigo de interpopola amikeco. Cv. Stamenova donacis al la infanoj belajn kaj varmajn ĉapetojn kaj gantojn, kaj krome, en la nomo de la esperantista familio Stefka kaj Nikola Aleksiev — pantalonetojn kaj faketojn.

La lerneja estraro kore dankis pro la varmaj atento kaj zorgoj flanke de sofiaj esperantistoj.

Ljubka MANDALOVA

Exmouth

Exmouth estas malgranda urbo okcidente de Southampton. Vespere de la 4-a de aŭgusto ni jam atingis tiun urbon, kie loĝas mia leteramiko s-ro Russell W. Hamilton. Li jam rezervis por ni bonan hotelon.

Sinjoro Hamilton tuj venis vidi nin. Li estas eksa profesoro de gimnazio, veterano de Esperanto kaj aspektas ege vigla kaj juneca spite al siaj 82 jaroj!! Lia edzino Nell ankaŭ estas simpatia esperantistino. Dum la sekvaj 4 tagoj ili afable akompanis nin. Ni rigardis vidindaĵojn en kaj ekster la urbo. Precipe impresa estis la bela vidaĵo de la maro kaj la haveno.

Vespere ĉirkaŭ 10 esperantistoj el la regiono kunvenis en la hejmo de s-ro Hamilton, por bonvenigi nin kun teo kaj bongustaj kukoj.

Bristol

La 8-an de aŭgusto ni estis en Bristol, granda urbo en sudokcidenta Britio, kie por ni jam aranĝis tranoktejon f-ino Dorothy M. Fulford, eksstatoficistino kaj delegito de UEA por la urbo. Ŝi kondukis nin per aŭto al diversaj lokoj en kaj ĉirkaŭ la urbo, inter kiuj speciale ĝojigis mian filineton la

granda kaj bone aranĝita Zoologia Ĝardeno. Ni ankaŭ estis invititaj al vesperrango en la hejmo de f-ino Fulford, kiu loĝas tute proksime de nia hotelo. Bongustaj manĝaĵoj atendis nin, kaj ni pasigis tre agrable la tempon.

Edinburgo

Post Bristol ni restis 4 tagojn en la tiel nomata Distrikto de Lagoj (Lake District), de la 12-a ĝis la 15-a de aŭgusto. Tie la pejzaĝo estas impona kaj beleaga, abundas memorlokoj de eminentaj poetoj kaj verkistoj de la angla literaturo. Eĉ tie ekzistas eta Esperantujo kun s-ro W.J. Nesbitt, kiel delegito. Mi provis kontakti lin, sed bedaŭrinde li ne estis hejme.

La 16-an de aŭgusto ni alvenis al Edinburgo, la malnova ĉefurbo de Skotlando. La urbo havas multajn historiaĵojn kaj estas tre belaspekta. La kastelo kaj la reĝa palaco certe estas la du plej impresaj lokoj de la urbo.

En tiu urbo mi sukcesis kontakti la esperantiston s-ron Ronald Calder, kiu estas emerita oficisto kaj delegito de UEA por la urbo. Li helpis nin ĉirkaŭrigardi la urbon kaj la Botanikan Parkon, kiu ŝajnis al mi kvazaŭ paradizo sur la tero. Jam en Londono mi rimar-

kis, ke en la britaj urboj abundas larĝaj, verdaj terenoj, publikaj parkoj. Tio devenas de la profunda amo de britoj al la naturo.

Londono (refoje)

La 22-an de aŭgusto ni revenis al Londono per superekspreso „Fluganta Skoto” (Flying Scotchman). Miaj familiaĵoj forflugis el Londono al Japanio la 24-an de la sama monato kaj nun mi estis denove sola en la Eŭropa Esperantujo. Mi restis ankoraŭ unu semajnon en la hejmo de s-ro Buttinger, kaj utiligis la liberan tempon por viziti sennombrajn vidindajn lokojn de Londono kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Post la forveturo de miaj familiaĵoj mi estis en medio, en kiu oni ne komprenas japanan lingvon. Tamen ne gravas. Certe estis ĝojo por mi vivi en Esperantujo ĉiutage. Mi senlace vagadis en la Parko Richmond, ĝardeno Kew, Palaco Hampton, k.t.p.

En la domo de s-ro Buttinger alvenis kaj foriris preskaŭ ĉiun tagon esperantistoj el diversaj landoj. Se mi detale skribus pri individuaj gastoj, kiujn mi renkontis tie, mi povus verki grandan volumon pri interpopola komunikado, sed bedaŭrinde mankas spaco.

(Daŭrigota)



La 7-an de decembro 1986 ĉesis bati la koro de unu el la plej fide-

laj, plej agemaj kaj abnegaciaj esperantistoj en Ruse — nia karmemora E-veterano Boris Petrov Kavalĝiev.

Ne plu estas inter ni la neforgebla, junece aŭdaca batalanto por venko de la ideo pri paco kaj interfratiĝo de la popoloj, la ekskluzive modesta, resonema kaj saĝa kreanto, kiu dum sia tuta konscia vivo okupiĝis pri la problemoj de la E-movado.

Nur antaŭ kelkaj monatoj, la 22-an de aŭgusto 1986 en la urba E-klubejo oni solene celebris lian 85-jariĝon. Kaj antaŭ niaj okuloj, kiel sur filmbendo, pasis lia longa sencoplana vivo: dum la unuaj tagoj de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio Boris Kavalĝiev estis studento en Petrogrado. Reveninte Bulgarijon, li laboris kiel fervojisto, en 1919 partoprenis la fer-

vojistan strikon. Dum sia tuta vivo li sindone servis al la idealoj de esperantismo, kooperativismo kaj sobereco.

Boris Kavalĝiev verkis pli ol 100 versaĵojn kaj poemojn. Iuj el ili aperis en alilandaj Esperanto-gazetoj en Italio, Hispanio, Brazilo k. a. Li regule partoprenis la naciajn E-revuojn de E-kanto kaj parolo. En aprilo j. k., en Razgrad, li gajnis sian lastan grandan premion inter dek premiitaj konkursajoj.

Honora membro de BEA kaj de DE de BEA—Ruse, honorita per multaj distingoj de nia Asocio, Boris Kavalĝiev merite okupis elstaran lokon en la bulgara Esperanto-movado, kiu ĉiam vakos.

Ni kliniĝas antaŭ lia kara memoro.

Pensoj pri ĝojo

Kio estas ĝi? La ĝojo estas tiel varia kaj bela sento! La vivo antaŭ ĉio estas ĝojo — kun miloj da nuancoj kaj hobiaj! Mi spiradas profunde la freŝan kaj puran aeron, kio estas ja ĝojo! Mi vidas la lumon kaj sentas la kareson de l'varmo! Ili estas la unuaj necesaj elementoj de la vivo. Ĉi-tio ankaŭ estas ĝojo! Sed mi estas homo kaj vivas sur nia planedo ne kiel besto — aŭ insekto — mi havas intelektajn bezonojn! Ĉi-tio estas ja la plej granda ĝojo! Mi posedas racion, mi lernas, studas, praktikas profesion. Mi laboras, kaj la kapablo labori estas ankaŭ ĝojo granda! Mi kapablas pliperfektigi kaj progresi en mia profesio kaj esti utila al miaj samlandanoj. Mi havas familion: edzinon, filojn, genepojn kaj tiu ĉi familia rondo estas tiel granda ĝojo! Mi apartenas al mia bulgara lando, en kiu mi estas naskita kaj mia ĝoja devo estas vivi kaj labori por ĝia progreso. Mi estas majstro en mia profesio, pro kio mi ofte aŭdas dankon! Ĉi-tio ankaŭ estas ĝojo! Se ĉiuj civitanoj estas bonaj specialistoj en sia faklaboro, sendube la granda nacia sukceso estus nia plej granda komuna ĝojo!

Sed la ĝojoj sekvas: kiam mi vidas kaj ĝuas la diversajn kreaĵojn — de gepatroj, geavoj, eĉ praavoj, ĝoje mi respektas ilian kontribu-laboron. Tamen, kiam mi ankaŭ kontribuas propramane al la konstruado de la nova grandioza vivo, mi ĝojas, ĉar mi ne vivas vane!

Observante la naturon — belegajn bonodorajn flo-rojn, pejzaĝojn, arbojn, — mia admiro estas ĝojo! Mi provis planti propramane junarbeton, poste ĝi kreskis kaj donis fruktojn. Estis granda ĝojo mangi la dol-ĉajn abrikotojn de mia propra arbo!

Foje mi aŭdis ĉe televidaparato la rakonton de iu profesoro, kiu dum 20 jaroj instruis al studentoj sciencajn konojn kaj poste, ekzamenante ilin, kontroladis, ĉu la semoj falis en bonan grundon! Laboro mal-facila, sed ĝoja kaj utila, diris la profesoro.

Kiam mi startis kiel juna filo, por preni la stafeton el la manoj de mia patro, la ĝojtremo en mia koro estis la ĝojo de nova generaciano!

Nun, kiel maljuna patro, mi kun ĝojo transdonis la stafeton al miaj du filoj, deviginte ilin porti ĝin kiel indaj civitanoj!

Sed mi petas vin, permesu al mi ne forgesi nian komunan, esperantistan ĝojon, kiu regas en la koroj de la plej fidelaj adeptoj de nia nobla kaj humana idealo. Forte kaj alte ni tenu la verdstelan standardon ĝis la fina triumfa gloro! Kun ĝojo kaj fiero jam 65 jarojn mi portas surbruste, sur mia koro, la karan verdan steleton.

Ĉu vi pensas, ke la ĝojoj jam finigis? Tute ne! Ili daŭre nestos en viaj koroj, ili sekvos unu la alian kiel belaj floroj, karegaj gefiloj, karegaj samnacionoj, karegaj samideanoj, survoje al nia bela kaj feliĉa estonta vivo!

Boris P. KAVALĜIEV

Noto de la redakcio:

Tiu eseo de nia karmemora regula kaj verkema kunlaboranto Boris Kavalĝiev estas lia lasta kontribuajo, klun ni ricevis.

FIERA BILANCO

S-ano Hugo Röllinger, Theresienstr. 23, D, 8730 — Bad Kissingen aperigis en gazeto „Heroldo de Esperanto“, n-ro 1743-44 detalan tabelon titolitan „Fiera bilanco“. En ĝi li donas interesajn detalojn pri la 459 stratoj, placoj, monumentoj k. s. en 4 kontinentoj, en 29 landoj nomitaj aŭ „Zamenhof“ aŭ „Esperanto“.

Bulgario estas sur la kvara loko en tiu nomaro, kun registritaj 42 objektoj, post Francio — 82, FRG kaj Pollando — po 44. Certe la tabelon oni povas korekti kaj pliampleksigi. En la korto de la Internacia Esperanto-Kursejo, vilaĝo Pisanica, antaŭ kelkaj jaroj estis inaŭgurita busto de Zamenhof. Ĝi mankas en la tabelo.

La tabelo ankaŭ informas, ke plej multaj objektoj en Bulgario estis nomitaj „Zamenhof“ aŭ „Esperanto“

en 1959, kiam la homaro festis la 100-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. Post tiu ĉi jaro, dank' al la klopodoj de la lokaj Esperanto-organizaĵoj estas nomitaj ankoraŭ kelkaj objektoj, okaze de Esperanto-kongresoj.

Nun, kiam ni estas antaŭ la sojlo de la centjariĝo de Esperanto, la bulgaraj esperantistoj devas klopodi, ke en ĉiuj urboj kaj pli grandaj vilaĝoj estu oficiale nomitaj objektoj „Zamenhof“ kaj „Esperanto“. La estraro de la Turista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio per speciala letero al la filioj de BEA petis ilin ekagi por atingi tion. Verŝajne tre baldaŭ oni povos legi en „BE“ pri la unuaj bonaj rezultoj. Se oni ekagis aktive kaj persiste, la Esperanto-stratoj, placoj k.a. en nia lando povus trioblīgi.

Nikola NIKOLOV

Jen fragmento de la tabelo de H. Röllinger, kiu rilatas nian landon:

n-ro	loĝloko	strato	placo	aleo	objekto	jaro
1.	Asenovgrad		E			1956
2.	Bankja	E				1959
3.	v. Borima			E-parko		1959
4.	v. Borima	Z				1963
5.	Burgas	E				1962
6.	v. Govedarci	E				1959
7.	Ĥaskovo	E				1959
8.	Jambol	E				1959
19.	Kazanlâk	E				1959
10.	Karlovo	E				1963
11.	Karlovo	Z				1963
12.	Kubrat		Z			1959
13.	Kubrat	E				1959
14.	Loveĉ	E				1963
15.	Orjahovo (sur Danubo)				E-insulo	1930
16.	Pazarĝik	E				1959
17.	Pirdop	Z				1960
18.	Pleven	E				1959
19.	Pleven	Z				1960
20.	Ĥilovdiv	Z				1959
21.	Ĥolski Trâmbeŝ	E				1959
22.	Popovo	E				1946
23.	v. Proslav	Z				1960
24.	Ruse			E		1962
25.	Ruse		Z			1962
26.	Sevlievo	Z				1959
27.	v. Slavjanovo	E				1959
28.	Smoljan	Z				1967
29.	Smoljan	E				1967
30.	Sofio	E				1942
31.	Sofio	Z				1959
32.	St. Dimitrov	Z				1963
33.	St. Zagora	Z				1959
34.	Veliko Târnovo	E				1960
35.	Trjavna	Z				1964
36.	Varna		E			1958/78?
37.	Pleven			aleo de la amikeco		
38.	Dimitrovgrad				Z-monumento	1963
39.	v. Rozino				Z-hospitalo	
40.	monto Vitoŝa				E-montodomo	1963
41.	Orjahovo				E-domo turista	1965

Esperanto en la „tria mondo“

D-ro Renato CORSETTI

La aŭtoro estas estrarano de UEA, kaj de pluraj jaroj li okupiĝas pri la disvastigo de Esperanto en la tria mondo. La sekvan artikolon ni represas el „Der Esperantist“, n-ro 1/1986 — kun mallongigoj.

Multaj esperantologoj konsentas pri tio, ke Esperanto postvivis sian iniciatinton ne pro struktura perfekteco, sed pro ekzisto de komunumo, kiu ligis al la lingvo ne-lingvajn idealojn. La tuta preskaŭ cent-jara historio de tiu komunumo montras ĝian rezistokapablon kaj ĝian konkero-kapablon. Temas, kompreneble, pri paca konkero de mensoj, kie ajn sin prezentas ŝancoj pri tio.

Ni plenrajte fieras pri la disvastigiteco de nia komunumo en miloj da urboj, kaj en dekoj da landoj: tiom pli ni rajtas fieri, se ni konsideras, ke ĝi estas rezulto nur de sindediĉo de centmiloj da homoj, kiuj laboris kaj plue laboras en tre malfacilaj kondiĉoj meze de indiferento kaj kontraŭ potencaj faktoroj. Tio, tamen, rilatas nur al la „unuaj“ kaj „duaj“ mondoj, por uzi laŭmodan, neprecizan, sed tuj efikan disdividon de nia terglobo. En la „tria mondo“ nia komunumo, kaj ĝia lingvo estas tre subrepresentataj. En la unuaj jardekoj de ĉi tiu jarcento estis apenaŭ eble paroli pri la internacia lingvo al afrikanoj, azianoj kaj parte ankaŭ al sudamerikanoj. Ili havis tiom da pli urgaj problemoj, ili apenaŭ „ekzistis“, tio estas: la kultura vivo en tiuj landoj estis tute sufokata de koloniistaj elitoj, kiuj klopodis planti tie sian metropolan kulturon. Sed en la lastaj jardekoj, post la fino de koloniismo, afrikaj, aziaj kaj sudamerikaj landoj ekaperis sur la internacia scenejo, kaj komencis vivi sian memstaran vivon eĉ se inter ĉiuj specaj problemoj. Prave, do, ĝuste en ĉi tiu periodo la Esperanto-movado venis al analizado de la situacio de Esperanto ekster Eŭropo kaj al klopodoj por ŝanĝi tiun situacion. Ĉi tiu agado daŭras en la ĝis-nuna formo proksimume la lastajn dek jarojn, „kaj ni ekzamenos ĝin ĉi-sube post bird-okula trarigardo de la nuna pozicio de Esperanto en la preparolataj mondopartoj.“

A Z I O

Esperanto eniris Azion jam komence de ĉi tiu jarcento, sed ĝi enradikiĝis kaj floris nur en kelkaj landoj: Ĉinujo, Japanujo, Vjetnamujo kaj Koreujo. En tiuj landoj nun ekzistas fortaj movadoj, kiuj sukcesas kontraŭpezi la forton de la movadoj en eŭropaj landoj.

En aliaj aziaj landoj estas nur sporadaj aretoj da esperantlingvanoj, kaj en kelkaj kazoj nur malmultegaj izoluloj.

Lastatempe la movado vigliĝis en Hindujo, en Pakistano kaj en Irano. En Hindujo deko da lokaj Esperanto-grupoj, lastatempe kunigitaj en landan federacion, estas parte fruktoj de la semoj plantitaj de sinjorino Haudebine (kiu vivis tie longajn jarojn) kaj parte rezultoj de la agadoj de entuziasmaj hindoj aperintaj dum la lastaj jaroj.

En Pakistano ekzistas promesoplena organizaĵo, kiu sukcesis eĉ eldoni lernolibron en la urdua, kaj jam disbranĉigas en kelkaj lokaj grupoj. La ekapero de amas-karaktera movado en Irano antaŭ kelkaj jaroj estas ĉefe dankinda al la agado de unu homo, d-ro Saheb-Zamani, kiu kapablis utiligi sian socian prestiĝon por atingi amaskomunikilojn, universitatojn ktp. Pro la progresemaĵoj, kontraŭimperiismaj idealoj, kiujn la irana movado havis de la komenco, ĝi travivis la nacian „revolucion“ post la forpelo de la ŝaho. Esperable la evoluo de tiu lando ebligos plifirmigon de Esperanto post tiom flagra starto.

AJ R A B L I N Ĝ V A J L A N D O J

Pro kialoj ne tute kompreneblaj la Internacia Lingvo neniam renkontis grandan simpatian, lernpretecon,

apogojn en mezorientaj kaj nordafrikaj arablingvaj landoj. Siatempe ekzistis organizaĵoj en Maroko kaj kursoj en Egiptujo, sed temis pri faroj de eŭropanoj loĝantaj tie.

En la nuna momento ekzistas nur ne organizitaj grupoj de esperantistoj en preskaŭ ĉiuj tiuj landoj de Jemeno al Maroko, sed ili ne sukcesas vastigi sian nombron aŭ influon al la ĉirkaŭa socio. La plej agema rondo troviĝas en Damasko kaj laboras por pretigi Esperantan-araban vortaron. Kontaktoj kun la araba organizaĵo por kulturo kaj scienco (ALECSO) estas tre bonaj, sed ili ĝis nun ne portis konkretajn rezultojn. Male, en Israelo ĉiam estis relative forta movado. Kompreneble ĝi estas forŝlosita el kontaktoj kun esperantistoj en la najbaraj landoj.

A F R I K O

Afriko el nia vidpunkto estis ĝis antaŭ kelkaj jaroj nur insulo norde de Malagasio. Fakte nur en Malagasio, danke al la agado de kelkaj francaj esperantistoj en la 30-aj jaroj, ekzistis relative vasta esperantlingva komunumo. Bedaŭrinde, pro la granda distanco ĝi estas tute enfermita en si mem, kaj kiel okazas en malgrandaj fermitaj vilaĝoj, oni ĉefe pasigas la tempon per internaj kvereloj. Ne pasas jaro sen fondo kaj malfondo de almenaŭ du novaj inter si rivalaj Esperanto-organizaĵoj.

Lastatempe sekve de kunordigita informkampanjo ekestis viglaj komencantaj movadoj kaj en la landoj de la okcidenta kaj en la landoj de la orienta marbordoj.

S U D A A M E R I K O

En multaj sudamerikaj landoj vivas multnombraj esperantlingvaj komunumoj. Foje, laŭ nombro, la tiea movado superas tiun en pluraj okcident-eŭropaj landoj. Ilia ĉefa problemato estas la malproksimeco de la movadaj centroj kaj la sekva manko de sento pri aparteno al tiu tutmonda movado. Malgraŭ niaj pretendoj al solvado de ĉiuj mondaj problemoj per la Internacia Lingvo, ni ofte eĉ ne sukcesas solvi problemojn de interkompreniĝo kaj interproksimiĝo en la movado mem. Libroj eldonataj en Eŭropo tre malrapide kaj en ne sufiĉa kvanto atingas Brazilon aŭ Japanujon kaj inverse.

La Universala Kongreso en Brazilo helpis proksimigi la sudamerikajn esperantistojn al la alikontinentaj, kaj helpis almenaŭ konsciigi la eŭropajn esperantistojn pri la ekzisto de fortaj Esperanto-komunumoj en Suda Ameriko.

PASINTA KAJ ESTONTA AGADO DE UEA-TEJO

Dum la lastaj jaroj la agado de la centraj instancoj de la movado baziĝis sur sistema kuraĝigo de la kernoj agentaj en triamondaj landoj. Oni korespondis kun ili, konsilis ilin, sendis al ili informan kaj instruatan materialon. Temis pri „rutina“ agado, kiu montras siajn rezultojn nur en la daŭro de la tempo. Ĝi ne apartenas al tiuj agadoj, kiuj promesas „la finan venkon“ dum la posta monato, nek al tiuj agadoj, kiuj celas atingi tujan kaj grandan prestiĝon por la lingvo (agnosko fare de ŝtat-prezidantoj, funkcioj de internaciaj organizaĵoj ktp.).

Ĉio-ĉi kune kun sendado de lernolibroj al ĉiuj triamondaj inform-petintoj, portis kelkajn rezultojn, kvankam ankoraŭ malgrandajn kaj ne ĉiam rekte atribueblajn al tiu agado.

Ni citu nur unu ekzemplon. La Esperanto-movado en Kubo jam organiziĝis kaj ĝi aliĝis al UEA kaj ekpartoprenas la internacian esperantlingvan vivon. Certe tio ŝuldiĝas al la favoraj cirkonstancoj en Kubo, al la laboro de kelkaj tieaj entuziasmoj, al la favoraj reĝoj el socialismaj landoj, kiuj ricevis kubajn registarajn instancojn okupigantaj pri la problemoj. Sed tio parte ŝuldiĝas ankaŭ al la daŭra kontaktado de

kubaj esperantistoj fare de kelkaj funkciuloj de UEA-TEJO jam de antaŭ dek jaroj. Oni sendis hispanlingvajn librojn, vortarojn, informilojn. Oni daŭre sekvis la evoluon kaj klopodis reŝanĝi estingigintan veron, trovi la financajn rimedojn por helpi en ĉiu ebla maniero. Kaj jen finfine venas rezulto.

Same, kiam Hinda Esperanto-Asocio (aŭ Federacio de Esperanto en Bharato, aŭ la nomo, kiun ĝi alprenis) paradas en la jarlibro, oni certe ne rajtas forgesi, ke por tio kelkaj homoj jam laboras de jardekoj.

Turnopunkto por la preparolata agado estis kunveno pri „Landa Agado“ (tio estas la ne tuj signifmontra kodnomo, kiun aktivuloj uzas) okazinta dum la Universala Kongreso en Stokholmo. Tie oni decidis aldoni al la „normala“ respondado al informpeto kaj alsendado de instrumentaro al petintoj, novan pli aktivan agad-branĉon.

Esence temas pri „atako“ de nur unu-du landoj en ĉiuj kontinentoj ĉiun jaron pere de inform-kampanjoj lanĉataj el Eŭropo. Praktike oni aperigas seriojn de gazetaj anoncoj kaj artikoloj en la cel-landoj, kaj respondas ilin per lernolibroj kaj informiloj. Ne ĉiuj ricevantoj de tiuj lernolibroj lernas, sed ankaŭ ne ĉiuj ricevintoj de la unua tia dissendo farita de Zamenhof lernis. La rezultoj, ĉefe en Afriko, ne mankas.

Intertempe ankaŭ la „tradicia“ agado estis rearanĝita por atingi pli da efikeco. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj nur unu komisiito faris la korespondan laboron, dum la Centra Oficejo faris la enpakan kaj sendan laboron. La mono por la tuto venis el la Fondajo Azio-Afrikio. Nun kvar homoj respondecas pri rilatoj respektive kun Azio, arablingvaj landoj, Afriko kaj Suda Ameriko. Krom la Fondajo Afriko-Azio plu funkcianta en Roterdamo ĉe la Centra Oficejo, alia Fondajo starigita en Tokio ĉe Japana Esperanto-Instituto, sed kun partopreno de ĉiuj japanaj esperantistaj organizaĵoj liveras la financajn rimedojn. Finfine japanoj sukcesis organizi konkretigi sian intereson je la disvastiĝo de Esperanto en aliaj aziaj landoj. Ne subtakinda, kaj ne subtakota estas la kontribuo, kiun povas doni esperantistoj kaj esperantistaj instancoj en socialismaj landoj.

Budapeŝto jam disponigis sian preskapablon por kambaĝo vortaro kaj por vjetnama lernolibro. Ĉeĥa Esperanto-Asocio siatempo disponigis centojn da „Paŝoj al Plena Posedo“ por triamondaj esperantistoj. Bulgara Esperantista Asocio pretas helpi por vjetnama lernolibro ktp.

Siatempo jugoslavoj ankaŭ destinis parton de la mono restinta post la Beograda kongreso al Fondajo Evoluolandoj, kiu helpis financi eldonon de lernolibroj en kelkaj lingvoj.

Sed ekzistas ankoraŭ grandaj agadoblecoj, ankraŭ por unuopaj esperantistoj, kiuj minimume povus sisteme korespondi kun triamondaj esperantistoj por helpi ilin eliri el sia izoliteco, kaj ligi tiujn homojn al rilatoj, kiuj estas la plej bona garantio pri plua restado en la movada komunumo.

Varbado de triamondaj studentoj, kiuj multas en tiuj socialismaj ĉefurboj, estas alia agad-kampo.

KIAL ĈI TIU AGADO?

Ofte oni aŭdas kritikojn pri la koncepto mem, sur kiu baziĝas ĉi tiu tuta agado. La plej bona maniero por konvinki afrikanojn — oni argumentas — estas laborado por ke Esperanto grandskale akceptiĝu en Eŭropo. Tiam aliaj kontinentoj sekvas. Ĝis nun ili ja ĉiam sekvis nin.

Certe, se morgaŭ eŭropaj registaroj decidus enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn, tio fortigas la pozicion de nia lingvo ankaŭ en aliaj mondopartoj, sed... Unuflanke ŝajnas preferinde apogi sur la propraj fortoj, kiuj povas porti al pli firma progreso ol eble neniam venontaj registaraj decidoj, kaj aliflanke necesas jam konvinkiĝi, ke la mondo iĝas pli plurcentra kaj ke ne necese iu antaŭiras kaj iu alia sekvas.

Esperanto estis iniciatita kiel tutmonda lingvo, kaj ĝi pluhavas ĉi tiun universalisman pretendon. Ĝi cele iĝas pli kaj pli mallargaj niaj horizontoj kaj maladekvataj niaj fortoj, se ni daŭre priatentas nur la malnovajn mondopartojn. Jam nun ĉiuj internaciaj organizaĵoj (UNO, Unesko ktp) havas pli larĝan membron-bazon ol nia UEA, kaj tio estas tre danĝera signo.

Cu ekzistas sukcesoj ankaŭ por tia agado? Cu ni, kiuj malsukcesas disvastigi Esperanton en, ekzemple, Svisujo, povas sukcesi en Nepalo?

Kun ĉiuj eblaj limigoj, mi tamen respondas, ke jes. Niaj ĉefaj aliancanoj en tiuj landoj estas la „freŝeco“, la manko de antaŭjuĝoj, la lernemo, la sincera deziro pri progreso de la tieaj homoj.

Ni ne forgesu, ke similaj faktoroj estis tiuj, kiuj permesis la ekeston de nia movado fine de la pasinta jarcento en Eŭropo inter la laborista kaj etburga tavoloj de la tiamaj socioj.

Enlanda movado

INTERESA SOLENAJO

La 10-an de novembro 1986 en urbo Pravec okazis solenaĵo lige kun la komenco de la nova E-lernoĵaro. Ĉeestis pli ol 70 personoj — malnovaj esperantistoj, komencantoj, amikoj de Esperanto. Karaj gastoj estis Ivan Culev — prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA — Sofio, Zlatko Corbanov — prezidanto de turista societo „Gradište“ en Pravec, la esperantisto-veterano Nikola Peev-Esperanto el v. Gurovo. Mallongan paroladon faris la prezidantino de societo „Standardo de la paco“ en Pravec Cvetanka Lilova. La partoprenintojn gratulis Iv. Culev kaj bondeziris al ili sukcesan esperantan lernoĵaron.

Emociaj kaj interesaj estis la rememoroj de la E-veterano Nikola Peev-Esperanto, kiu rakontis al la juĝuloj pri sia amo al Esperanto kaj pri korespondado. La solenaĵon partoprenis la ĉarmaj kantistinoj el la grupo „Buntaj kravatoj“, kiuj ĝojigis la ĉeestantojn. Mihail Cobanov belege recitis bulgare kaj esperantlingve, restigis en la animoj neforgeseblajn rememorojn. La fama humoristino el Bojana — Jana, per sia plenumo gajigis kaj amuzigis ĉiujn.

NOVA MEDICINISTA SOCIETO

La 13-an de novembro pasintjare en Veliko Târnovo 23 geesperantistoj-medicinistoj fondis Esperanto-societon „D-ro Vârban Genčev“.

La solenan fondkunvenon ĉeestis multaj gastoj, inter kiuj estis ankaŭ Kuna Coneva, fratino de la pereinta esperantisto-antifaŝisto d-ro Vârban Genčev. Stefan Conev — prezidanto de la Distrikta Komitato de la Aktivaj Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo, Nikolaj Kolev — sekretario de la Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto, membroj de la Distrikta Estraro de BEA.

Hristo Dolčinkov — parolis pri la praktika apliko de Esperanto en diversaj profesioj.

En sia konciza parolo la reprezentanto de Patrolanda Fronto Nikolaj Kolev emfazis la rolon de Esperanto por amikiĝo kaj fratiĝo de homoj kun diversaj politikaj kaj realigaj konvinkoj, por internacia kompreniĝo, tiel necesa por konservo de la monda paco.

Kun ega intereso la ĉeestantoj aŭskultis rememorojn pri la patrono de la nove fondita societo, kiujn rakontis lia fratino Kuna Coneva, kiu afable donacis al la societantoj portreton de sia frato kaj broŝuron pri lia mallonga, sed glora vivo.

Baldaŭ post la fondo de la societo ĝiaj estraranoj havis laborkunsidon, kiun ĉeestis prof. d-ro Kiril Popov — prezidanto de la Medicina Sekcio ĉe BEA,

Cv. LILOVA

Leonid SENJ

GASTE EN KIEVO

Kun miaj amikoj—membroj de la esperantista klubo „Ora Pordego“ en la ĉefurbo de sovetia Ukrainio Kievo mi konatiĝis antaŭ pli ol 7 jaroj. Dum aŭgusto ĉi-jare mi denove estis ilia gasto kaj vizitis ilian E-klubon. En malgranda, sed bone aranĝita salono sur strato „Turgenevskaja“ 27 ĉiumarde je la 19 horo kolektiĝas homoj diversaj kaj kun diversaj profesioj, sed ĉiuj portas en siaj koroj la amon al la Internacia Lingvo. Tie sonas nur Esperanto kaj ĉiu gasto vere sentas sin en esperanta medio.

Mi petis Svetlana Pogorelaja — estrarinino kaj unu el la fondintoj de la klubo, rakonti pri ĝia agado:

— Nia klubo „Ora Pordego“ estas fondita en 1973. En ĝi membras ĉirkaŭ 50 esperantistoj — de infanoj ĝis pensiuloj. La kluban laboron partoprenas laboristoj, inĝenieroj, instruistoj, studentoj. ... kaj ĉiu okupiĝas pri multo. Ekzemple Vladimir Dimarskij, inĝeniero—instruas, gitarludas, verkas kantojn; Mihail Genin — pensiulo, laboras kun veteranoj, okupiĝas pri agadoj porpaca, instrumentodika, internacia, helpas novajn esperantistojn. Ĉiu klubano, depende de siaj interesoj kaj deziroj, elektas por si okupojn. Tiu formo de laboro, laŭ nia sperto, amikigas la homojn.

Nia klubo „Ora Pordego“ ĉiam aktive partoprenas en landajn Esperanto-tendarojn kaj aranĝojn. Unu klubano estas membro de la prezidio kaj du — de la estraro de Ukraina Respublika Filio de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. En la Esperanto-movado de Sovetunio „Ora Pordego“ estas konsiderata tre bona.

Membroj de nia klubo tutkore strebas al plifortigo de la paco kaj amikeco inter la popoloj kaj korespondas kun geesperantistoj el multaj landoj de la tuta mondo. Ni ĉiam ĝojas ricevante leterojn de novaj korespondantoj. Nia adreso estas: Sovetunio, 252191, Kievo 191, a.k. 666-5, Genin Mihail Jefimoviĉ.

Ce nia klubo funkcias ankaŭ infana klubo „Raduga“ („Ĉielarko“). Niaj infanoj kaj ilia gvidantino Maria Kolos korespondas kun infanoj el la tuta mondo — en Esperanto kaj en rusa lingvo. Dezirantoj korespondi bonvolu skribi al: Sovetunio, 252054 Kievo, str. Turgenevskaja 27, KID „Raduga“, LEO-604, Maria Kolos.

Vladimir JELEV

III PoSET

De la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1987 ni aranĝos la III Potsdaman Soveran Esperantistan Tendaron (PoSET). Ĝi ebligas ferian renkontigon de esperantistoj proksime de kultura centro — la distriksturbo Potsdam kaj de la ĉefurbo Berlino, en junulargastejo „Pirschheide“.

Tie ekzistas ebleco por tranoktado en bangaloj (po 8 litoj), aparte por viroj kaj virinoj. Oni ne povas kuri mem, sed estas ebleco por maten- kaj vespermanĝoj en junulargastejo. La prezo por unu persono estas 90 markoj por la tuta semajno kaj inkluzivas tranoktadon, maten- kaj vespermanĝojn.

Limdato: por aŭgusto: 31.05.1987.

Pluajn informojn kaj aligilojn oni povas ricevi ĉe:

Brigitte Raabe
Sulzbacher Steig 1
Staakon/GDR
1546

ŽILINA INVITAS VIN

En la tagoj 2-8.8.1987 en Žilina (Ĉeĥoslovakio) renkontiĝos turistoj kaj naturamikoj el diversaj landoj dum la IX Turismaj Tagoj. La partoprenantoj loĝos en studenta hotelo en 2- kaj 3-litaj ĉambroj, kun neesejo kaj lavejo. Ili vizitos la plej belajn regionojn de la montaroj Malgranda Tatra (kun fama Vrátna-valo) kaj Ŝulov-rokaron, kie okazos tuttagaj piedekskursoj en 3 kategorioj (A — ekskursoj por bonaj turistoj, B — modere malfacilaj ekskursoj, C — promenoj en la naturo por pli aĝaj naturamikoj kaj familioj kun malgrandaj infanoj). Krome estas preparita unu tuttaga busekskurso, rostando de lardo kaj vesperaj amuzprogramoj. La partoprenkotizo estas 490 Kčs por enlandaj kaj 590 Kčs por eksterlandaj partoprenantoj. Estas eble mendi: matenmanĝojn, vespermanĝojn kaj 2 tagmanĝojn sume por 200 Kčs. Detalajn informojn petu ĉe: Inĝ. Juraj Gondžur, Levočská 3, 010 08 Žilina, CSSR.

Konkursoj

„ESPERANTO EN TURISMO“

Lige kun la jubilea jaro de Esperanto — 1987, Internacia Asocio „Monda Turismo“ organizas konkurson „Esperanto en Turismo“ pri jenaj temoj:

1. „Kion fari por Esperanto-turismo post la jubilea jaro de Esperanto?“

Alvena limdato: 15. 3. 1987

La plej bonaj konkursajoj estos premiitaj per senpaga partopreno en la konferenco de Monda Turismo okazonta dum la 12-aj Tagoj de Bydgoszcz la 18—24. 07. 1987.

2. „Ĉu Esperanto-turismo helpas la Esperanto-movadon?“

Alvena limdato: 15.09.1987

Premioj: Senpagaj partoprenoj en Esperanto-aranĝoj dum la jaro 1988.

La konkursajojn bonvolu sendi en du tajpitaj ekzempleroj al la adreso de la vicprezidantino Elizabeta Palóš, Yhl Miklós u. 9 I. 9. H-7633 — Hungario.

„Monda Turismo“ publikigos la plej interesajn konkursajojn ĉu fragmente, ĉu plenforme. Ĉiu konkursinto ricevos la eldonaĵojn de „Monda Turismo“ dum 1988.

Atendante viajn kontribuojn ni deziras al vi sukceson.

Estraro de „MONDA TURISMO“

Noto de la Redakcio:

Ĝis nun jenaj bulgaroj gajnis premiojn: „Sennajna restado en Svedio kaj Turkio“ — Lili Koleva, D. Mutšev, A. Ilkov — en Pollando.

POR TRADUKEMULOJ

DE de BEA en Plovdiv anoncas konkurson por esperantigo de versaĵoj de plovdivaj poetoj (Ivan Nikolov, Nikolaj Gjulev, Nikolaj Zajkov, Petăr Anastasov k. a.) La konkurso estas anonima. La rezultojn oni anoncos dum la Internacia Fira Esperantista Renkontiĝo (8—10. 05. 1987). Detalajn informojn petu de DE de BEA — Plovdiv, tel — 26-94-99.

Limdato por ricevo de la tradukoj (kaj la bulgaringva originalo) 30.03.1987. Adreso: 4000 Plovdiv, p. k. 184, DE de BEA, por la konkurso.



NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE UEA

En la oktobra numero de revuo „Esperanto“ de 1986 oni publikigis la nomojn de kvin novaj honoraj membroj de UEA: Tibor SEKELJ (Jugoslavio) Ye ZAISHI kaj Zhang QICHENG (Ĉinio), Yukiko ISOBE (Japanio) kaj Catherine Z. SCHULZE (Usono).

SEMINARIO EN BAD SAAROW

Inter la 10-a kaj 15-a de novembro 1986 en Bad Saarow (apud Berlino, GDR) denove okazis Internacia Esperanto-seminario, ĉi-foje pri temo „Historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la Esperanto-movado“. Partoprenis 21 fakuloj kaj interesitoj el Bulgario, CSSR, FRG, GDR, Hungario kaj Pollando. Entute 14 prelegoj pri la supre menciita temo kaj pri motivoj de eklerno de Esperanto kaj forlaso de la movado donis abundegan materialon por diskutoj. Samtempe kun la traktado de la ĉeftemo okazis serio da kunsidoj sub la gvido de la estrarano de UEA, prof. Otto Haszpra, pri la estonta agado rilate scienc-teknikan aplikadon de Esperanto.

INSTRUADO EN UNIVERSITATOJ

La sesa eldono de listo de Esperanto-kursoj en supera edukado aperis lastatempe en Belgio. La listo, kiu laŭ sia kompilinto Germain Pirlot verŝajne ne estas kompleta, donas detalojn pri kursoj en 125 institucioj de supera edukado en 28 landoj. Inter ili setas dekkvar en Usono, dekdru en Pollando, naŭ en Sovetunio kaj eĉ tridek unu en Ĉina Popola Respubliko. Aliaj landoj, kiuj aperas en la listo estas Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Francio, Federacia Respubliko Germanio, Hispanio, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Kolombio, Koreio, Nederlando, Rumanio, Sanmatino, Sudafriko, Venezuelo, kaj Vjetnamio.

ATENTO AL ESPERANTO

Pri klopodoj konvinki Unuigintajn Naciojn pli vaste uzi Esperanton oni ofte mencias en la gazetaro kaj per la radio kaj televido. Lastatempaj artikoloj kaj intervjuoj de aŭ pri volontuloj ĉe la oficejo de UEA en Novjorko, kaj pri ilia agado, aperis en North Country This Week kaj The Watertown Times, gazetoj el norda Novjorka Ŝtato, kaj en la mallongondaj servoj de la Aŭstralio Elsenda Instanco, Radio Sofio, Radio Polonia kaj Radio Pekino. Ankaŭ raportis kelkaj lokaj radiostacioj. Antaŭ kelkaj monatoj aperis ankaŭ artikolo en The New Yorker.

Internacia gazetara servo ĉe UEA

POR VIA MANGOTABLO



Supo el porkaĵo

Oni dispecetigas 400 gramojn da porkaĵo kaj surverŝas ĝin per malvarma akvo. Post ekblo de la akvo oni aldonas salon, 1 dispecetigitan pecon da poreo, 1—2 karotojn, pecon da celerio, 3—4 petroselradikojn kaj 10—15 grainojn da nigra pipro. Kiam la viando estas preskaŭ kuirita, oni elprenas la radikojn kaj dispecetigas ankaŭ ilin. Al la buljono oni aldonas 1 pomon — senŝeligitan kaj dispecetigitan, kaj du supkuleronj da rizo. Kiam la rizo estas preta, oni deprenas la kaserolon desur la fornelo kaj aldonas kirlitan ovoflavon kun 2—3 kuleronj da jahurto. La supon oni proponas kun muelita nigra pipro.

„Kapama“

„Kapama“ estas manĝaĵo, kiun oni nepre preparas en ĉiu domo en la Pirinmontara urbeto Bansko — okaze de edziĝfestoj aŭ de la Novjaro ĝi okupas decan lokon sur ĉies mangotablo.

Por ĝin prepari oni bezonas grandan argilan kaserolon kaj jenajn produktojn: 1 kg da lardo, en kiu tie kaj tie estas iom da viando; 1 kg da muelita porkaĵo; 250—300 gramoj da porkaj ripoj aŭ unu ostopeco; 1 kokino aŭ 1 malgranda leporo; 2 meze grandaj kapoj da acida brasiko; 1 sangokolbaso; duontaso da rizo; 2 bulboj da cepo; 2 tekuleronj da nigra pipro kaj salo.

Oni dispecetigas la cepon kaj fritas ĝin kun 1 kaptaso da porka graso, oni aldonas la muelitan viandon kaj ankaŭ ĝin fritas. Poste oni aldonas la rizon, la salon kaj la nigran pipron. Oni miksaĵon ĉion, aldonas 1 $\frac{1}{2}$ glason da akvo kaj lasas ĝin boli ĉe modera temperaturo, ĝis kiam la rizo absorbas la tutan akvon. Kun parto de la rizo oni faras la kokinon. Poste per la restinta viandmiksaĵo oni preparas farĉitajn buletojn el folioj de la acida brasiko. La neutiligitajn brasikfoliojn oni dispecigas, ankaŭ la lardon — en grandajn pecojn.

Sur la fundo de la kaserolo oni ordigas la lardopecojn. Sur ili — parton de la dispecetigita brasiko, la kokinon, la ostopecon aŭ la ripojn. Ĉirkaŭ ili oni aranĝas la farĉitajn buletojn. Fine oni metas ankaŭ la sangokolbason kaj kovras ĉion per kelkaj grandaj folioj de acida brasiko. Ĉiujn produktojn oni spicas per muelita nigra pipro.

La tiel preparitan mangaĵon oni surverŝas per 1 taso da bolanta akvo kaj lasas ĝin ekblo sur la fornelo. Antaŭ tio oni surŝmiras la kaserolan kovrilon per farunpasto. Oni lasas la mangaĵon stufi ĉe modera temperaturo en daŭro de almenaŭ tri horoj. De tempo al tempo oni denove surŝmiras la kaserolan kovrilon per farunpasto, se necese.

La pretan mangaĵon oni proponas en granda telero: en la mezo oni metas la kokinon aŭ la leporon kaj la sangokolbason, kaj ĉirkaŭe — la farĉitajn buletojn, la brasikon kaj la lardopecojn.



DEZIRAS KORESPONDI

RUMANIO

18—28-jaraĝaj rumanaj ĝejunuloj, anoj de la esperantista turisma kaj alpinisma rondo „ESPEMONT“ dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj, precipe pri turismo kaj reciprokaj vizitoj:

- F-ino Chinaloglu Adriana — str. Raditei 15, et. 1, ap. 4 sector 5, RO-76138, Bucuresti 69
F-ino Serban Doina — str. Dunavat 9, bl. 57, et. 4, s-A ap. 13, sector 5, RO-76619, Bucuresti 69
F-ino Tanase Georgeta — str. Coltei 23, bl. 23, S-1, et. 1, ap. 6 sector 3, RO-70446, Bucuresti 37
S-ro Mitran Aurelian — calea Rahovei 325, bl. 13, S-C, et. 6 ap. 140, sector 5, RO-76423, Bucuresti
S-ro Ionita Stefan — str. Aleksandru Moghioros 20, bloc OD1 Sc. 6, et. 5, ap. 224, sector 6, RO-77372, Bucuresti 66.
S-ro Gheorghe Nicusor str. L. Rebreanu 6, bl. B1, Sc. 9, et. 7, ap. 381, sektor 3, RO-74623, Bucuresti 57.
S-ro Cosma Dan — Bd. Miciurin 9, bl. 5, Sc. B, et. 7, ap. 29 sector 1, RO-71314, Bucuresti
S-ro Beko Stefan — str. Constructorilor 14, bl. 14, Sc. 2, et. 3 ap. 33, sector 6, RO-77765, Bucuresti 17
S-ro Titu Cornel Adrian — Aleea Terasei 7, Bl. A2, ap. 1, Sector 4, RO-74230, Bucuresti
S-ro Mahalu George — bd. Iosip Broz Tito 40, bl. C13, Sc. 3 et. 3, ap. 41, Sector 3, RO-74558, Bucuresti
S-ro Dulamita Nicolae — Laurentiu Sosenia Colentina 2, Bloc ALMO, 1, Sc. 3, et. 7, ap. 117, sector 2, RO-72252, Bucuresti
S-ro Manolescu Ferdinand — comuna Grindu, RO-8420, JUD. ialomita — pri ŝakludo, elektroniko.
S-ro Grigore Costița — sat Pancesti, comuna Sasun, RO-5435, jud. Bacau.

VENEZUELO

- Palmar Ibis (matematikistino) — Maracaibo, Apartado 322 — pri kulturoj en diversaj landoj.
Labarka Sara (universitata profesoro) — Maracaibo, Conanto Residencial la Paragua, edificio Cuchivero II ap. 6B, Delicias Norte. — interesiĝas pri kino k. a temoj.
RIOS Garcia Yaneth (studentino pri matematiko) — Maracaibo — Monte Carlo av. ĉ. calla A, A-14. — pri lingvoj.
Delgado Elda (studentino pri biologio) — CABI-MAS, Carretera „J“ 122 — pri lingvoj.
Hurtado Guillermo (universitata profesoro pri fiziko kaj komputado) kaj lia edzino — Maracaibo, Apartado 10253 of. Bella Vista — pri geografio kaj kulturo.
Guzman Hermando (studento pri matematiko) — Maracaibo, Apartado 15250 — pri ŝakludo.

ENHAVO

- II UNESKO: 40 jaroj da agado (Amadou Mahtar M'Bow)
1 Por sopra vivmaniero! (Nikola Aleksiev)
2 Tradicia festo (Veneta Baleva)
4 Esperantistoj en la hispana civitana milito (Nikola Mladenov)
6 Niaj veteranaj: „Ni semu konstante. . .“ (Georgi Nejkov)
7 Juna esperantisto: Konatiĝu: Kataluna E-Junularo (Hektor Alos i Font)
8 Ni recenzas
8 Raporto el Eŭropa Esperantujo (Yoshiaki Mizuno)
12 Fiera bilanco
13 Esperanto en la „tria mondo“ (D-ro Renato Corsetti)
14 Enlanda movado
16 Tra la mondo
III Deziras korespondi
IV Verdaj steletoj

Sur la unua kovrilpaĝo:
Vintro en la montaro.

ABONU REVUON „SCIENCA MONDO“

Abonu revuon „Scienca Mondo“, oficiala organo de la Monda Federacio de Sciencistoj. Ĝi estas luksa grandformata eldonaĵo aperanta kvinfoje dum la jaro. Ĉiu numero enhavas 32 paĝojn. Al ĝi kunlaboras per popularsciencaj artikoloj eminentaj sciencistoj el la tuta mondo.

Jarabono por Bulgario — 1,50 levoĵ, por eksterlando — 3 rubloj aŭ 7,5 suisaj frankoj. Ŝi akceptas abonojn dum la tuta jaro. Abonigu viajn amikojn kaj korespondantojn en eksterlando.

Adreso: Bulgario 1504 Sofio, str. Oborište 53, Asocio de la Sciencistoj en Bulgario, redakcio de „Scienca mondo“.

NI KONDOLENCAS

La 1-an de decembro 1986 en Ĥarkovo, USSR, forpasis **VENJAMIN N. MARKOV**, prezidanto de la Ĥarkova E-klubo kaj peranto de „Bulgara Esperantisto“ en Ĥarkovo.

En sia 53-jara aĝo en julio 1986 subite forpasis la aktiva rumana esperantisto el Timișoara, d-ro **L. PODARIO** — iniciatinto de la kunlaboro inter la esperantistoj de Timișoara kaj Pazargik.

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENOVA, Dimitar HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

VERDAJ STELETOJ



ELIN PELIN

LA FLUGMASINO DE JAN BIBIJAN

Sur la aerodromo de la Mara Urbo staris la flugmaŝino, per kiu Jan Bibijan intencis veturi al la Luno.

Miloj da homoj amasiĝis por vidi tiun mirindan maŝinon.

Vere, ĝi prezentis strangan bildon. Sur du malgrandaj radoj kun dikaj pneŭmatikoj staris la korpo de la flugaparato, brilanta sub la sunradioj, simila al grandega fiŝo kun flavaj metalaj naĝiloj. Ambaŭflanke de la grandega korpo estis fiksitaj ŝtuparoj kun balustradoj. Supre estis la enirejo, hermetike fermiganta. Ambaŭflanke de la korpo viciĝis malgrandaj rondaj fenestroj kun dikaj glimaj vitroj. Similaj fenestroj, sed pli grandaj, estis ankaŭ ambaŭflanke de la kapo de tiu fiŝo, kiu devis flugi en la senlima spaco.

kretajn inventojn. Li kunprenis ankaŭ kelkajn novajn armilojn, ne pli grandajn ol ordinara fotoaparato. Tiuj armiloj funkciis dank' al strangaj nevideblaj radioj. Ili ne mortigis. Ili nur haltigis kaj sendangerigis ĉiun vivantan estaĵon atakantan, ĉiun moviĝantan maŝinon kaj repuŝis maŝintatien eĉ la plej pezan obuson.

En la flugaparato estis ankaŭ kelkaj malgrandaj kaj malpezaj aviadiloj, ne pli grandaj ol montara aglo, funkciaj same per radioondoj, produktataj de ili mem.

Per tiuj aviadiloj Jan Bibijan intencis veturi sur la Luno.

Tiu ĉi stranga flugaparato staris sur la aerodromo, provokante miron kaj timon. Apud ĝi staris Kotulo, kiu donis klarigojn al la publiko kaj permesis al neniu tuŝi ĝin.

Kotulo fariĝis bela junulo kun helaj okuloj kaj fle-re levita kapo. Lian vizaĝon ĉiam lumigis bela kaj bona rideto. Parolante pri Jan Bibijan, li inspiriĝis kaj lia vizaĝo estiĝis ankoraŭ pli bela.

Iuj homoj moke demandis lin:

— Ĉu vi alportos pecon de la Luno? Oni diras, ke ĝi estas el oro.

Kotulo gentile kaj serioze respondis:

— Ni vizitos la Lunon ne por serĉi oron. Nia celo estas sciencaj esploroj. Jan Bibijan volas servi al la scienco, li deziras, ke la homoj penetru en la sekretojn de tiu malproksima enigma mondo.

— Ĉu vi sukcesos?

— Se ni ne esperus sukcesoj, ni ne forveturus. Ni flugos, ne nur por travivi aventuron, malgraŭ ke nin gvidas ankaŭ nesuperebla sciivolemo. Ni fidas la potencon de nia maŝino. Jan Bibijan antaŭvidis ĉion. Se ni ne revenos post unu jaro, observante dum belaj serenaj noktoj la ĉielan belulinon — la Lunon, vi sciu, ke tie troviĝas niaj tomboj.

Dirinte tion, Kotulo trankvile ridetis.



Ĉu Jan Bibijan de Esperantujo?

Foto: Buĉukov, Ruŝe

La maŝina interno estis nealirebla por la publiko. Tie estis kajuto por la kosmonaŭtoj, en kiu estis muntitaj radioonda reguligilo kaj transformatoro de kosmaj radioj.

Kelkaj grandegaj reflektoroj vidiĝis sur la korpo. En la vosto troviĝis la nutrajdeponejoj, aparataro por produktado de aero kaj de akvo, rezervaj partoj. Tie estis ankaŭ la ĵus inventita aparato por produktado de lumo multe pli forta ol la suna, destinita por lumigi la kosman spacon.

La flugmaŝino estis miraklo de la nuntempa tekniko, kies atingojn Jan Bibijan ĝenie aplikis, por fari siajn se-

Restis nur kelkaj tagoj ĝis la forflugo. En la urbo estis miloj da homoj, alvenintaj el ĉiuj landoj de la mondo. El tuta Eŭropo kaj Ameriko estis alvenintaj raportistoj de la plej grandaj gazetoj. Ili nerve kuradis tien-reen kaj ĉiu el ili volis paroli kun Jan Bibijan.

Por trankviliĝi ilin, Jan Bibijan anoncis, ke du tagojn antaŭ la forveturo li faros prelegon pri sia flugo kaj adiaŭos la Teron kaj la tutan homaron.

(El la romano „Jan Bibijan sur la Luno“)

Esperantigis: Lidia RAEVA